

人民中國郵政

# El Popolo Cinese

Feb.-Mar. 1952

2-3



# Forta Gardilo de Paco kaj Sekureco

—Parolado de Ĉefministro Ĉou En-laj en la celebra kunveno por la 2-a datreveno de la kontraktiĝo de la Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo—

Karaj kamaradoj, karaj amikoj:

Hodiaŭ, la ĉina kaj Sovetunia popoloj kaj la pacamaj popoloj de la tuta mondo varme festas la 2-an datrevenon de la kontraktiĝo de la Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo. La kontraktiĝo de la Traktato havas grandan historian signifon en la nuntempa mondpolitiko. En la saluttelegramo al Prezidanto Maŭ Ze-tung okaze de la 2-a datreveno de la fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko Generalisimo Stalin diris: “Estu ĉiam fortika la granda amikeco de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Unio de Sovetiaj Socialistaj Respublikoj—forta gardilo de paco kaj sekureco de la Malproksima Oriento.” Kaj en la saluttelegramo al Generalisimo Stalin antaŭ unu jaro Prezidanto Maŭ Ze-tung diris: “La kontraktiĝo de la Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo ne nur ege helpas la konstruadon de la nova Ĉinio, sed ankaŭ forte garantias kontraŭ agreso kaj por la defendo de paco kaj sekureco de la Malproksima Oriento kaj la tuta mondo.” Ĝuste pro tio, la granda alianco inter Ĉinio kaj Sovetio kiuj havas 700 milionojn da enloĝantoj, fariĝis nevenkebla forto en la mondo.

La profunda amikeco de la ĉina kaj Sovetia popoloj baziĝis jam en la tempo de la Oktobra Revolucio, helpe de kiu la ĉina popolo trovis marksismo-leninismen—la armilon por venki la malamikojn kaj gajni la triumfon de la revolucio. Post la Oktobra Revolucio, la Sovetia registaro laŭ la politiko de Lenin kaj Stalin unue nuligis la faritajn de la Imperia Rusio traktatojn malfavorajn al Ĉinio, kaj poste, la Sovetiaj popolo kaj registaro eĉ plurajn fojojn helpis la liberigon de la ĉina popolo. Ĉe la fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko la Sovetia registaro la unua agnoskis la novan Ĉinion. En la pasinta tempo de pli ol du jaroj ĝis nun la Sovetiaj popolo kaj registaro donis al ni fratajn helpojn en la konstruado de nia lando. La granda Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo estas bazita sur la longtempa kaj profunda amikeco de la ĉina kaj Sovetia popoloj. Nun okaze de la celebrazo por la 2-a datreveno de la kontraktiĝo de la Traktato ni la ĉinaj popolo kaj registaro esprimas niajn elkorajn dankojn al la Sovetiaj popolo kaj registaro pro ilia granda amikeco kaj helpo.

Rerigardante la evoluon de la mondsituacio en la pasintaj du jaroj, precipe la evoluo de la situacio en Azio, ni despli klare vidas, kiom profundan antaŭvidon montris kaj kiom grandan defendforton donis por la paco kaj sekureco de la Malproksima Oriento kaj la tuta mondo la Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo kontraktita sub la persona direkto de Generalisimo Stalin kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung mem.

La Traktato klare difinis la fundamentajn taskojn: “kune gardi kontraŭ la releviĝo de la japana imperiismo kaj kontraŭ novaj agresoj de Japanio aŭ alia lando kiu komplotas kun Japanio por agreso en ia ajn maniero” kaj “firmigi la daŭran pacon kaj ĝeneralan sekurecon de la Malproksima Oriento kaj la tuta mondo”. Nun

la fakto jam pruvis ke la imperiista Usono kaj ĝiaj satelitaj ŝtatoj estas revivigantaj la japanan militarismen, malamike traktantaj Ĉinion kaj Sovetunion, minacantaj Azion kaj preparantaj novan kaj pligrandskalanan agresmiliton.

En junio de 1950 la Usonaj imperiistoj entreprenis la agresmiliton kontraŭ Koreio kaj samtempe okupis nian teritorion Tajvan. La heroaj Korea Popola Armeo kaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj brave leviĝis por rezisti unu post la alia kaj donis pezajn batojn al la agrestrupoj de la Usona imperiismo kaj ĝiaj satelitaj ŝtatoj kaj pelis ilin de Jalu-Rivero al la proksimo de latitudo 38. Sur la korea batalkampoj, la agresmilito entreprenita de la Usona imperiismo kaj ĝiaj satelitaj ŝtatoj jam definitive fiaskis. La malamikoj estis devigataj komenci intertraktadon pri armistico.

Ricevinte en la korea milito tiel severan fiaskon la Usonaj imperiistoj unuflanke senhonte prokrastas la intertraktadon pri armistico en Koreio kaj daŭre okupas Tajvan por konservi la t.n. “streĉan situacion”, kaj aliflanke en tiu ĉi “streĉa situacio” intencas en la Malproksima Oriento kaj Azio prepari novan kaj pligrandskalanan agresmiliton. En septembro de la pasinta jaro, la Usona imperiismo kaj ĝiaj satelitaj ŝtatoj kontraktis kun japana Joŝida-registaro la kontraŭlegan kaj unuflankan “Pactraktaton de San Francisko” kaj samtempe la “Usona-Japana Pakton de Sekureco”. En decembro de la pasinta jaro la ĉefministro Joŝida de la japana reacia registaro “garantiis” al Usono ke li kontraktos “Duflankan Traktaton” kun la restantaj Kuomintang-banditoj en Tajvan, kaj esprimis ke li daŭre helpos Usonon en ĝia agreso kontraŭ Koreio kaj Ĉinio. Sub la direktado de Usono la angla registaro en Hongkong permesas la restantaj Kuomintang-banditojn enŝteliĝi tra Hongkong kaj Koŭlon en nian provincon Kuangtung por subfosado. En la Sudorienta Azio: Usono instigas la al Birmo forpeltajn banditsoldatojn de Kuomintang ataki nian landlimon, kaj subtenas la francan imperiismen en ĝia agresmilito kontraŭ nia najbaro Vietnamia Demokratia Respubliko; kaj ĉi-jare en januaro Usono, Britio kaj Francio aranĝis en Vaŝingtono stabestrangan sekretan kunvenon de la tri landoj por diskuti pri komuna plano kiel vastigi la agresojn en la Sudorienta Azio. En la regionoj de Pacifiko: Usono kontraktis kun Filipinoj “Traktaton de Komuna Defendo inter Usono kaj Filipinoj”, kaj kun Aŭstralio kaj Nov-Zelando “Trifrankan traktaton de Sekureco inter Usono, Aŭstralio kaj Nov-Zelando”. En la Organizaĵo de Unuigitaj Nacioj per sia voĉdona maŝino, Usono daŭre tenas la Ĉinan Popolan Respublikon ekstere. Je la 1-a de februaro, 1951, ĝi devigis la Ĝeneralan Kunvenon de la Unuigitaj Nacioj akcepti la hontindan decidon kalumnii la Ĉinan Popolan Respublikon. Kaj sammaniere je la 1-a de februaro, 1952, ĝi devigis akcepti la absurdan rezolucion kalumnii Sovetion.

La pivoto de tiu ĉi serio da agoj de la Usona imperiismo estas revivigi la japanan militarismen kaj rearmi Japanion por fari militan minacon al la Ĉina



Popola Respubliko, malamike kontraŭstari Sovetunion kaj per tio prepari novan kaj pligrandskalan agresmiliton en la Malproksima Oriento por minaci la sekurecon de la tuta Azio. Sed la ĉina popolo kiu jam venkis la japanajn invadintojn, renversis la reakcian regadon de Kuomintang kaj nun ankaŭ fiaskigis la Usonan imperiismon en Koreio, neniel timas tian minacon, kaj havas plenan konvinkon frakasi la agresajn intrigojn de la Usona imperiismo kaj ĝiaj satelitaj ŝtatoj. Krome, la ĉina kaj Sovetunia popoloj jam delonge antaŭvidis ĉi tiun serion da agresaj intrigoj de la Usona imperiismo kaj ĝiaj satelitaj ŝtatoj. Artikolo 1 de la Ĉinia-Sovetunia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo klare difinas: "Ambaŭ traktato-kontraktintoj garantias peni kune uzi ĉiujn necesajn rimedojn por malebligi novan agreson kaj pacodetruon de Japanio aŭ iu ajn alia lando kiu komplotas kun Japanio rekte aŭ malrekte en agresa agado. Se unu el la traktato-kontraktintoj estas atakata de Japanio aŭ alianca lando de Japanio kaj sekve estas en stato de milito, la alia traktato-kontraktinto devas tuj doni al ĝi militan kaj aliajn helpojn per sia tuta povo." Tio despli klare montras ke la Ĉinia-Sovetunia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo estas "forta gardilo de paco kaj sekureco de la Malproksima Oriento".

Hodiaŭ okaze de la celebrego de la 2-a datreveno de la kontraktiĝo de la Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo, ni esprimas nian senliman simpatian al la japana popolo vivanta en mizero. Al la japana reakciularo kiu perfidas la intereson de la japana nacio kaj servas la Usonan imperiismon, estas tre malavantaĝa la Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, kaj Interhelpo, sed al la japana popolo ĝi estas tre avantaĝa. Ambaŭ la ĉinaj kaj Sovetiaj popoloj kaj registaroj faris klarajn esprimojn pri siaj profundaj simpatioj al la japana popolo kaj ĝia liberiga batalado. Tiun ĉi deziron profunde esprimis Generalisimo J. V. Stalin en sia letero por saluti la japanan popolon okaze de la ĵuspasinta Novjaro. La ĉina registaro ankaŭ diris en sia deklaro de la 18-a de septembro 1951: "La Centra Popola Registaro de la Ĉina Popola Respubliko deziras vidi ke la japana popolo akiru demokration, sendependecon, pacon kaj progreson, kaj la ĉina popolo deziras vivi en paco kaj unuigi en amikeco kun la japana popolo por gardi la pacon de la Malproksima Oriento. Pro tio, la ĉina popolo esprimas sian senliman bonvenigon kaj simpatian por la batalado de la japana patriota popolo de ĉiuj socitavoloj kontraŭ la naciperfida Traktato de San Francisko, kaj ĝia klopodo por akiri rapidan finiĝon de la milita stato kaj gardi pacan kunvivadon inter Ĉinio kaj Japanio. Ni forte kredas, ke la batalado de la japana popolo ankaŭ ricevos varman bonvenigon kaj subtenon de la tutmondaj pacamaj popoloj kaj ke la japana popolo certe gajnos la finan venkon." Depost la kontraktiĝo de la t.n. "Pactraktato de San Francisko" kaj "Usona-Japania Pakto de Sekureco" en lasta septembro, la liberiga movado de la japana popolo vige disvolviĝis. Ĉar la celo de la Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo estas gardi kontraŭ la releviĝo de la japana imperiismo, sekve ĝi estas la plej forta subteno al la liberiga movado de la japana popolo.

La Usona imperiismo estas la plej freneza malamiko de la ĉina kaj Sovetia popoloj kaj de tutmondaj pacamaj popoloj. Post la Dua Mondmilito la Usona imperiismo freneze ekspansias la armadon en sia propra lando kaj

siaj satelitaj ŝtatoj, konstruas militajn bazojn kaj rearmas okcidentan Germanion kaj Japanion intencante per tio fari militan sieĝon al Sovetio, Ĉina Popola Respubliko kaj la popoldemokratiaj landoj kaj sklavigi la popolojn de la tuta mondo kaj Azio. Tiu ĉi politiko de la Usona imperiismo jam puŝis siajn satelitajn ŝtatojn al ekonomia bankroto kaj ankaŭ kaŭzos en Usono mem novan krizon en ekonomio. Por profito de tre malgranda nombro da monopolistaj kapitalistoj, la Usona imperiismo kaj la reakciaj registaroj de ĝiaj satelitaj ŝtatoj riskas daŭrigi siajn frenezajn agojn. Tamen la potenca Sovetio jam pli potenciĝis ol antaŭ la Dua Mondmilito kaj la popoldemokratiaj landoj fariĝis ankaŭ pli fortikaj. Rezulte de la movadoj rezisto kontraŭ Usono kaj helpo al Koreio, agra reformo, subpremo de kontraŭrevoluciuloj, kampanjo kontraŭ korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo kaj kampanjo de pliprodukto kaj ŝparo, la nova Ĉinio ankaŭ senkompare pli potenciĝis. Alte leviĝis la politika konscio de la popoloj de Japanio kaj de la landoj en la Sudorienta Azio kaj Meza Oriento, kie jam disvolviĝas la popola liberiga batalado kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. La popolo de Eŭropo, Afriko, kaj eĉ de Ameriko kaj Aŭstralio ankaŭ tagon post tago vekigis. La ĉina kaj Sovetia popoloj neniel permesas la Usonan imperiismon freneze agi plu! La Aziaj popoloj neniel permesas la Usonan imperiismon freneze agi plu! Kaj ankaŭ la tutmondaj popoloj neniel permesas la Usonan imperiismon freneze agi plu!

En la pasintaj du jaroj ni jam donis pezajn batojn al la freneza agreso de la Usona imperiismo. Ni ne volas agresi iun ajn landon, niaj popolaj volontuloj iris batali en Koreio nur por repeli la agreson de la Usona imperiismo kiu marŝis al nia landlimo. En la armistika intertraktado inter la du militantaj flankoj, kiu komenciĝis de lasta julio en Kajsong kaj Panmunĝom, la delegitoj de Korea Popola Armeo kaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj faris tre grandan penon por konduki la intertraktadon al sukceso. Se ne pro la intencita prokrastado de la Usona flanko, la intertraktado estus jam antaŭlonge sukcesinta. Nun la sukceso de la intertraktado ankoraŭ dependas de tio ĉu la Usona registaro havas la veran volon pace solvi la korean problemon. Se la Usona registaro ankaŭ havas veran volon pace solvi la problemon en Koreio kiel ni, sukceso por la intertraktado estas ebla.

Kompare kun la pasinteco, hodiaŭ la situacio estas pli favora por la laboro de la tutmondaj popoloj en la defendo de paco kaj demokratio. Ni forte kredas, ke en la estonteco la agresaj intrigoj de la imperiistoj ricevos pli pezajn batojn. La agresaj intrigoj de la Usona imperiismo kaj ĝiaj satelitaj ŝtatoj povos porti al la homaro nur morton, katastrofon kaj mallumon. Sed la granda alianco de Ĉinio kaj Sovetio alportos al la Malproksima Oriento kaj la mondo pacon, feliĉon kaj lumon. Ni ĉina kaj Sovetia popoloj intime unuigu, kaj kune kun la popoloj Aziaj kaj tutmondaj batalu por la daŭra paco kaj universala sekureco de la Malproksima Oriento kaj de la tuta mondo! La venko certe apartenos al ni!

Vivu la Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo!

Vivu la eterna unueco de Ĉinio kaj Sovetio!

Vivu Prezidanto Maŭ Ze-tung!

Vivu Generalisimo Stalin!

# Haltu, Sangsoifaj Krimuloj!

*Mallongigo de la ĉefartikolo de la Pekina Popola Tagjurnalo je la 23a de februaro, alvokanta la popolojn de la mondo leviĝi kaj haltigi la krimagojn de la Usonaj agresantoj en Koreio en uzado de bakteriaj armiloj.*

La monstraj Usonaj agresantoj, kies manoj jam estas trempitaj en sango, lastatempe pliampleksigis sian longan liston de krimoj en Koreio per apliko de malhoma bakteria milito en granda skalo kontraŭ la heroaj, famaj Korea Popola Armeo kaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj, kaj kontraŭ la tuta Korea loĝantaro. Neniu justama homo en la tuta mondo povas ne koleriĝi je la hieraŭa novaĵo el la Korea fronto aŭ resti pasivaj antaŭ la teruraj krimoj de la Usonaj murdistoj.

Ja ĉiuj scias, ke malgraŭ la pezaj artileriaj bombaradoj, la Usonaj agresantoj malsukcesis iom ajn antaŭenpuŝi kontraŭ la pozicioj tenataj de la heroaj ĉinaj kaj koreaj popolaj fortoj; sekve, elĉerpinte siajn rimedojn kaj fortojn, ili elsendis siajn militajn aeroplanojn kun malsanojn dissemantaj insektoj por detruo la ĉinajn kaj koreajn popolajn heroojn kaj civilulojn per pesto, holero kaj aliaj pereigaj malsanoj. Per tiuj ĉi barbaraj rimedoj ili esperas gajni kion ili alimaniere ne povis. Tio ĉi estas la konduto de malesperaj frenezuloj absolute sen homaj principoj; krima ago kontraŭ la internaciaj konvencioj kaj sekvanta la ekzemplon de la faŝistaj krimuloj de bakteria milito en la Dua Mondmilito.

Nekalkuleblaj estas la malobeoj fare de la Usonaj agresantoj al internaciaj konvencioj. Ilia tuta listo de krimagoj estas tro longa por kalkuli. Ili uzis amas-ekstermajn armilojn kaj pli ol unufoje uzis venengason. Ili detruis kaj estas detruantaj vilaĝojn, urbojn kaj mortigis sennombrajn koreajn pacajn civilulojn kaj buĉis kaj torturis grandajn nombrojn da ĉinaj kaj koreaj militkaptitoj. Sed ĉio ĉi tio ankoraŭ ne povas ilin kontentigi kaj nun ili sin turnas al bakteria milito

kiu superas en terureco ĉiujn iliajn antaŭajn krimojn. La uzo de tia armilo de grandskala kaj sendistinga buĉado pruvas ke la Usonaj agresantoj estas la mortaj malamiko de ĉiuj pacamaj homoj en la mondo, la hardita malamiko de justeco kaj sekuro de la tuta homaro.


Ke la Usonaj agresantoj jam delonge planis la uzon de tiu ĉi armilo estas pruvita de atestaj materialoj. Ili faris ĉiujn eblajn klopodojn por ŝirmi la japanajn krimulojn de bakteria milito post la Dua Mondmilito; ili nutris ĉi tiun grupon da kanibaloj por laŭplane esplori kaj fabriki bakteriajn armilojn; ili sendis la japanajn krimulojn de bakteria milito al Koreio post kiam ili eksuferis pezajn malvenkojn por prepari pri bakteria milito; kaj ili uzis koreajn kaj ĉinajn militkaptitojn kiel kobajojn en bakteriaj eksperimentoj, provante sur ili siajn armilojn antaŭ ol ilin uzi en pli granda skalo sur la batalfronto. Kaj la krima agado sur la Usona surbordiga ŝipo n-ro 1091 jam delonge fariĝis publika sekreto. Ĉio ĉi montras ke la Usonaj agresantoj jam delonge kaj laŭplane preparas bakterian militon kunlaborante kun la japanaj krimuloj de bakteria milito.

Nun estas klare por ĉiuj kial la Usonaj agresantoj uzadas ĉiujn artifikojn por prokrasti la armistitan intertraktadon. Iliaj militaj aventuroj fiaskis. Ili estis devigataj konduki armistitan intertraktadon. Sed ili ne volas akcepti tiun pozicion. Uzante ĉiujn intrigojn por malhelpi la intertraktadon, nun ili penas sin eltiri el la malespera marĉo per tiu ĉi senhonta kaj absolute

*(daŭrigo sur p. 35)*

## Lernu Lecionon de Viaj Antaŭirantoj

de Ĉung Ling Fang Ĉeng



I. En decembro de 1949, 12 japanaj krimuloj de bakteria milito ricevis justan punon.

II. La malesperaj Usonaj agresantoj nun tamen denove faras tiajn malhomajn krimojn.



# La Popola Liberiga Armeo kaj la Tibeta Popolo

Post la subskribo de la *Kontrakto Pri la Rimedoj por la Paca Liberigo de Tibeto* je la 23a de majo, 1951, unuoj de la Popola Liberiga Armeo eniris tiun regionon. Per tio la tuta ĉina ĉeftero estis finfine liberigita el sub la regado de imperiismo kaj reakciuloj.

Marŝante en Tibeton, la Popola Liberiga Armeo transpasis kelkajn plej altajn montojn kaj plej furiozajn riverojn de la mondo, kaj ankaŭ vastajn regionojn da virgaj arbaregoj kaj perfidemaj marĉoj. Dum la antaŭenirado ĝi konstruis ŝoseojn kaj pontojn kie neniu simila iam ekzistis antaŭe.

Kvankam amikaj tibetanoj invitis la PLA-anojn loĝi en iliaj domoj por sin ŝirmi kontraŭ la ekstrema klimato, la armeanoj restis fidelaj al la PLA-tradicio neniam ŝarĝi la popolon kaj kampadis sub la libera ĉielo. Ili kunportis siajn proprajn proviantojn. Kiam la provizo prokrastiĝis pro neĝblovado, ili sin vivtenis per kampomusoj kaj sovaĝaj vegetaĵoj. Ĉi tiaj revolucia spirito kaj rigora disciplino tiel impresis la tibetanojn ke ili kromnomis la armeanojn "vivantaj Budaoj."

Jene estas kelkaj skizoj montrantaj la amikajn rilatojn inter la Popola Liberiga Armeo kaj Tibeta popolo.

## 1. Pontkonstruo trans la Jalung-Rivero

La Jalung Rivero fluas tiel rapide nun kiel en la pasinteco, plenigante la aeron per la muĝado de siaj torentoj. Sed ĝi estas ne plu la netranspasebla teruro kiel ĝi antaŭe estis. Nova ponto kapabla elteni pezajn ŝarĝaŭtojn kaj de tibetaj bovoj trenatajn ĉarojn estas konstruita de la Popola Liberiga Armeo super ĝi.

Kiel multaj aliaj riveroj sur la Sikang-Tibeta altebenaĵo, la Jalung-Rivero fluas suden, transtranĉante la Seĉuan-Sikang-Landvojon, la unua parto de la vojo al Lasa. La malmultaj ĉenpontoj antaŭe uzataj de la

tibetanoj por transiri la riveron estis konstruitaj centojn da jaroj antaŭe kaj sekve jam multe kadukiĝis. La tasko konstrui ponton super la Jalung estis asignita al la L. Sapeista Roto. Armeaj inĝenieroj sondis la riveron ĉe unu el ĝiaj transpasejoj kaj decidis ke 751 tunoj da ligno kaj 250 pontpalisoj estos bezonitaj. Sed neniu taŭga arbo estis trovebla ĉu en la valo aŭ kilometrojn ĉirkaŭe en la najbareco.

La armeanoj konsiliĝis kun la Tibetaj popolanoj kaj estis informitaj ke troviĝas bona ligno en iu monta arbaro 45 kilometrojn for. Sed, diris la tibetanoj, estas nenia rimedo por alporti la pezajn trunkojn malsupren tra la interspaca malebenaĵo.

Tamen, la anoj de L. Roto ekiris trans la neĝon al la montoj, tremante sub la severa malvarmeco kaj anhelante por enspiri aeron en la ekstrema alteco. Ili grimpis supren kaj supren, antaŭeniĝante tra la subkreskaĵoj. Kiam ili alvenis al la arbaro, ili tuj starigis siajn tendojn.

Dum du semajnoj, ili faligis per hakiloj la altkreskajn fortikajn arbojn. Ili laboregis de mateno ĝis nokto, interrompiĝante nur por tagmeza manĝo, kaj revenis al sia kampejo nur kiam vesperiĝis. Kelktaga neĝado duoble plimalfaciligis la laboron. Kiam la faligo estis finita, ili transportis la trunkojn malsupren, trenante kaj puŝante la lignon tra la ĝisgenue profunda neĝo, kun siaj kruroj kaj korpoj vunditaj de la kaŝitaj rokoj.

Fine la ligno estis amasigita sur la konstrua tereno kaj laboro por la ponto komenciĝis. Sed nun estiĝis alia malfacilo. La Jalung-Rivero ruliĝis antaŭen kun tia granda forto ke ĝi forpuŝis la palisojn antaŭ ol ili povis esti enmartelitaj profunden en la riverliton.

Tiam unu el la sapeistoj demetis sian kotonvatitan uniformon, saltis en la glacian torenton, kaj subtenis unu palison per sia tremanta korpo kontraŭ la kureganta akvofluo. In-

spirite de lia ekzemplo, aliaj sapeistoj ankaŭ aliĝis al li en la akvon. Tiamaniere la palisoj estis firmigitaj.

Finfine venis la tago por la inaŭgura ceremonio de la ponto. Kiam la unua ŝarĝaŭto transpasis la riveron, la tibetanoj kaj la sapeistoj longe hurais ĝis ili raŭkiĝis. La tibetanoj hurais, ĉar la unuan fojon trans ilia furioza rivero ponto estis konstruita. Koncerne al la sapeistoj, ili estis fieraj pri la laborfrukto kiun ili alportis al sia patrio.

Baldaŭ estis la vico de la L. Roto foriri. Ili antaŭenmoviĝis trans la ponto en ŝarĝaŭtoj, svingante adiaŭojn al la Tibeta popolo de la Jalung-Valo, la popolo kiu neniam ilin forgesos.

## 2. La Ŝoforoj de Ŝarĝaŭtoj

Laŭlonge de la nove konstruita Sikang-Tibeta Landvojo ekkomencis senĉesa fluo de trafiko. Tagon post tago, en vetero bona aŭ mala, spite de la terura malvarmeco en la nokto aŭ la brulanta varmeco de la tago, la ŝarĝaŭtoj de la Popola Liberiga Armeo rampadis supren kaj malsupren sur la zigzaga montvojo—fera fluo de provizaĵoj por la armeanoj marŝantaj al Lasa.

La ŝoforoj de la armeaj ŝarĝaŭtoj montris revolucionan heroismon kiu konas nenian malfacilon. Ili okuloj kongestiĝis pro longa laborado ĉe la direktilo. Ili lerte manipulis siajn veturilojn sur la mallarĝa monta vojo, kie gliteto povus frakasi la aŭton en la abismo milojn da futoj malsupre. En la nokto, la brilaj frontlampoj de la aŭtomobiloj prilumis la mallumajn brustojn de la montoj.

Kelkaj aŭtistoj veturigadis ĝis dek ok horoj ĉiutage, serpentumante supren kaj malsupren ĉe la multaj harpinglaj turniĝoj de la vojo.

Unu ekzemplo de la malfacilaĵoj venkitaj estas la maniero per kiu la ŝoforoj konkeris la monton "Kaŭĉuka Pinto." Ĉi tiu monto ricevis

sian nomon pro la fakto ke, proksime de ĝia supro, ĝia surfaco havas unike "elastan" kvaliton. Subite, kaj tute senavize, iu ŝarĝaŭto eksubiĝis en la gluecan koton ĝis la akso kaj troviĝis nenia alia rimedo krom malŝarĝi kaj elfosi. Fine la "Kaŭĉuka Pinto" estis venkita per nova sistemo. Nun estas ne malofte vidi kelkajn aŭtojn kunligitajn, kiuj moviĝas kiel nova speco de vagonaro. Tiele la provizajoj estas transportataj antaŭen.

### 3. Amikeco inter la Popola Liberiga Armeo kaj la Tibetanoj

En trankvila vilaĝo sur la Sikang-Tibeta altebenaĵo iu unuo de la Popola Liberiga Armeo estis atendanta ordonon por ekiri al Lasa—la ĉefurbo de Tibeto.

La batalantoj disloĝis en diversaj familioj. Ilia bona konduto tre plaĉis al la vilaĝanoj kiuj ilin bonvenigis en novembro, 1950. Nur tri tagojn post la alveno la batalantoj ekhelpis siajn gastigantojn finfari la aŭtunan draŝadon. Kiam venis printempo kaj la pala, ora suno varmigis la tegmenton de la mondo, la batalantoj memvole helpis al ili la semadon kiu poste alportis rekordrompan rikolton.

Aŭtuno venis kaj la tagoj mallongiĝis. Kiam la batalantoj ricevis ordonon ekmarŝi kaj ili komencis sin pretigi por iri al Lasa, ĉiuj Tibetaj familioj sentis bedaŭron. En unu el la kabanaj patrinoj sin turnis al filino kaj maltrankvile demandis, "Ĉu niaj fratoj el la Popola Liberiga Armeo vere foriros?" Apenaŭ ŝi finis siajn vortojn, jen la vickaporalo venis en la varman kuirejon. "Jes," li respondis kun rideto, "ni foriros je la tagiĝo."

La mastrino diris al li kiel ŝi malĝojos pro ilia foresto. Ŝi rememoris ke iu kuracisto de la Popola Liberiga Armeo resanigis ŝian filinon. Plue, kiam unu el la batalantoj vidis ke la familio ne havas korbon por kolekti legomojn li donacis al ili kvin korbojn kiujn li mem plektis el salik-branĉoj. Tiom multe da afablaj kaj ĝentilaj agoj la familio rememoris.

Nun la Popola Liberiga Armeo estis forironta. La maljuna virino insistis metis en la manon de la vickaporalo malgrandan manfaritan

monujon enhavantan pli ol 50 Tibetajn kupro-monerojn. "Prenu ĝin," ŝi petis, "vi bezonos aĉeti iom da ekstra manĝaĵo en Lasa." "Vi estas tre afabla," li diris, "sed niaj batalantoj neniam prenas ion ajn de siaj amikoj. Ni ja ne volas ĝeni la popolon."

Tiun vesperon la tuta familio estis tre okupata. La mastrino preparis sekigitan ŝafajon por ke la batalantoj ĝin manĝu dum sia vojaĝo kaj la filinoj flikis iliajn ŝuojn kaj ŝtrumpojn. Nek la batalantoj restis senfaraj. Ili kolektis legomojn por provizi la manĝaĵo-konservejon de la familio.

Ektiĝis. Hurlis sur la tegmento furioza vento kun pluvo. Ellitiĝinte eĉ pli frue ol la batalantoj la familio varmigis lakton por ili. "Vi trafos la celitan lokon sanaj kaj fortaj," diris komplezeme la mastrino, "se vi trinkas varmegan lakton antaŭ ol foriri."

La momento de disiĝo alvenis. "Ni neniam forgesos vin," diris unuvoĉe la familio. "Nek ni vin," kriis responde la batalantoj de la Popola Liberiga Armeo kaj ili salutis kaj ekmarŝis laŭ la vojo al Lasa.

### 4. Batalantoj en Paca Konstruado

Grandan pacan konstruadon nun entreprenas la batalantoj de la Popola Liberiga Armeo en la montgorĝoj de Sikang-Tibeta Altebenaĵo kiu situas proksimume 3,000 metrojn super la mar-nivelo.

Novaj ŝoseoj, pontoj kaj domoj estas konstruitaj en la mont-regionoj ĝis nun apenaŭ traireblaj.

Ĉe la flanko de monto estas oketaĝa kav-domo konstruita de iu unuo de la armeo laŭ ilia propra plano kaj per ilia propra tekniko. Ŝtuparoj, koridoroj, dormoĉambroj, manĝejoj, kluboj kaj oficejoj estas tiel aranĝitaj ke ĉie troviĝas sufiĉe da sunlumo.

Tie estas vastaj kortoj en kiuj ili plantis florojn kaj herbojn taŭgajn al la klimato de la altebenaĵo. Ekster la domo estas plantitaj diversaj arbedo.

Tiuj harditaj batalantoj montriĝas ankaŭ spertaj terkulturistoj. Por la unua fojo sur tiu ĉi sterila tero oni rikoltis grandajn kvantojn da karo-

Ĉiutage je la tagiĝo teamoj da batalantoj iras de tiu ĉi centro por konstrui ŝoseojn kaj pontojn ne zorgante ĉu la vetero estas bona aŭ malbona. Okaze de festotagoj aŭ libertagoj la domo fariĝas gaja kunvenejo por la batalantoj kaj proksime loĝantaj terkulturistoj. Ili kantas kaj dancas laŭ la ritmo de Tibeta muziko. La sloganoj sur la muroj de tiu ĉi granda konstruaĵo proklamas la celojn de la klopodoj de la batalantoj: "Konstruu novan Tibeton" kaj "Plifortigu la nacidefendon de nia patrio."

### 5. Rebonigo de Senfrukta Tero

Senprecedencan projekton en Tibeto nun entreprenas la Popola Liberiga Armeo por rebonigi centojn da hektaroj da senfrukta tero sur la ebenaĵoj ĉirkaŭ Lasa. Ne longe post kiam la armeo faris sian longan marŝon al tiu urbo, ili stariĝis produkt-komitaton kaj kunlaboras intime kun la Loka Tibeta Registaro diskutante pri diversaj problemoj tiurilataj.

Ĉiu ano de la armeo—de la komandantoj ĝis la batalantoj kaj malantaŭ-frontaj laborantoj—laboras tre streĉe malgraŭ granda neĝo kaj ekstreme malvarma vento. Eĉ Generalo Ĉang Kuo-hua, komandanto de la Popola Liberiga Armeo en Tibeto kaj Tan Kuan-san, politika komisararo, donas sian helpon spite de sia okupateco.

Krom la supre dirita projekto la armeo planas ekspluati karbominon kiun ili trovis ĉirkaŭ 50 kilometrojn for de Lasa. Multaj batalantoj kiuj estis antaŭe forĝistoj kaj ĉarpentistoj laboras kune kun la Tibetaj laboristoj por fari traborilojn kaj fosilojn por la nova mino.

La projekto ekfunkciis en la fino de la lasta novembro post 20 tagoj da vigla preparado. Dum tiu tempo la batalantoj havigis al si grandan kvanton da sterko kaj faris multajn ilojn kaj instrumentojn kunlaborante kun la Tibetaj ĉarpentistoj kaj forĝistoj.

La projekto pri rebonigo de la tero kiu restis senfrukta por tiom multe da jaroj fariĝas la ĉefa temo de la ĉiutaga babilado inter la loĝantoj en la urbo.

Trad. Ma Dion kaj I. K.



# La Virina Movado de Nova Ĉinio

Teng Jing-ĉaŭ

La liberigo de ĉinaj virinoj estas ĉiam intime interligita kun, ja formiĝinta konsistiga parto de, la liberiga movado de la ĉina popolo. Post la landskala venko de la ĉina popola revolucio kaj la fondiĝo de la Popola Respubliko de Ĉinio, ĉinaj virinoj—flankon ĉe flanko kun la viroj—jam fariĝis mastroj de sia lando. En siaj politikoj kaj dekretoj, la Centra Popola Registaro donas specialan atenton por protekti la interesojn de virinoj akorde kun la principo de egaleco inter viroj kaj virinoj.

Ekzemple, Artikolo 6 de la Komuna Programo, la fundamenta leĝo de nova Ĉinio, adoptita de la Popola Politika Konsiliĝa Konferenco, kondiĉas: “La Popola Respubliko de Ĉinio devas aboli la feŭdan sistemon, kiu tenas virinojn en katenoj. Virinoj devas ĝui egalajn rajtojn kun viroj en politika, ekonomia, kultura, eduka kaj socia vivo. Libero de geedziĝo por ambaŭ viroj kaj virinoj devas esti realigita.”

Artikolo 32 kondiĉas: “La specialaj intereso de junulo- kaj virino-laboristoj devas esti protektataj.” Kaj Artikolo 48 kondiĉas: “... atento devas esti donata al la protekto de la sano de patrinoj, beboj kaj infanoj.”

Aliaj leĝoj publikigitaj en nova Ĉinio, kiel la Geedziĝa Leĝo, la Leĝo de Agrara Reformo, kaj la Leĝo de Laboro, ankaŭ provizis konkretajn protektojn al la rajtoj de virinoj akorde kun la principoj de la Komuna Programo.

Ĉio ĉi helpis en liberigo de ĉinaj virinoj, kaj donis al ili, kiel al viroj, la samajn oportunojn kaj rajtojn en laboro, lernado kaj sociaj agadoj. La virinoj de Ĉinio jam faris grandajn paŝojn antaŭen: ili aktive partoprenis en la subpremado de kontraŭrevoluciuloj; en efektivigo de agrara reformo; en la kampanjo rezisti Usonon kaj helpi Koreion; kaj en aliaj politika-ekonomiaj movadoj.

## Leviĝo de la Soci-pozicio de Ĉinaj Virinoj

Akirinte egalajn rajtojn kun viroj en ĉiuj sferoj, la virinoj de nova Ĉinio ĝuas, politike, la rajton elekti kaj esti elektita por publika ofico. Granda nombro da virinoj nun estas laborantaj en ĉiurangaj registaraj organizoj, kaj akirantaj kompetentecon en ŝtato-administrado.

Tridek ses virinoj tenas gvidajn postenojn en la Centra Popola Registaro. Unu el la ses vicprezidantoj estas Sung Ĉing-ling. Ho Ŝiang-ning kaj Caj Ĉang estas membroj de la Konsilo de la Centra Popola Registaro. Ŝih Liang estas Ministro de Justeco, kaj Li Teh-ĉjuan estas Ministro de Publika Higieno.

287 el la membroj de provincaj kaj municipaj populaj konsiloj, aŭ 4.7 procentoj de la tuta membraro, estas virinoj. En kelkaj lokoj, virinoj partoprenantaj lokajn registarojn atingas eĉ pli grandan nombron. Laŭ statistiko kompilita en kvin urboj de Norda Ĉinio (Pekino, Ĉengĉoŭ, Ŝekiaĉuang, Paŭting kaj Tajjuan), 8 procentoj de la municipalaj registaroj estas virinoj. La konsiloj de la 16 distrikta registaroj de Pekino havas 35 virinajn membrojn — aŭ 16 procentojn de la tuta membraro.

Kamparaj virinoj ankaŭ entuziasme partoprenas en administrado de publikaj aferoj. En Honan-Provinco, ekzemple, en unu administra subregiono sola, pli ol 1,000 kamparanino-kadroj laboras en la distrikta registaro de 13 gubernioj. Laŭ statistiko el 43 vilaĝoj en la 12a Distrikto de Pekino, 13 procentoj de la vilaĝo-registaroj konsilanoj estas virinoj. En Sinkiang-Provinco, pli ol 500 virino-kadroj de diversaj nacioj partoprenas en administrado de distrikta aŭ gubernia registaro. La ĉefadministranto de Hoĉing-Gubernio en Sinkiang estas virino de mongola nacio.

En 1950, la proporcio de virino-partoprenantoj en diversrangaj konferencoj de populaj reprezentantoj estis meznombro 10 procentoj. En 1951, la nombro kreskis ĝis proksimume 15 procentoj. En kelkaj el la urboj kaj gubernioj ĝi atingis 30 procentojn.

Tiuj ĉi ciferoj pruvas la fakton ke virinoj estas jam ludantaj gravan rolon en la politika vivo de la ĉina popolo. Ĉiuj ĉi tiuj virinaj membroj de registaraj konsiloj kaj konferencoj de populaj reprezentantoj estas elektitaj de la popolo pro ilia kompetenteco. Ili ĝuas altan prestiĝon inter la popolamasoj kaj tenas intiman kontakton kun ili.

En Hopej-Provinco sin trovas modela vilaĝo, kie la vilaĝestro kaj vicvilaĝestro, kontrolistoj de publika sekureco kaj eduko ĉiuj estas virinoj. La honora nomo de “Modela Vilaĝo” estas donacita al ĝi ĉar tiuj ĉi virinoj organizis agrikulturan kaj ĝeneralan kampanon produkti tiel bone, ke iliaj atingoj superis tiujn de iun ajn alia vilaĝo en la sama gubernio.

Estas la entuziasmo, konscio de respondeco kaj la atingajoj, kiaj tiuj ĉi, kiuj pograde forigas la restojn de malrespekto kaj malestimo al virinoj kiujn virinoj suferis en la pasinteco.



Tri elstaraj virinoj: Caj Ĉang (maldekstre) kaj Teng Jing-ĉaŭ (dekstre), prezidanto kaj vicprezidanto de la Tutĉinia Demokrata Virina Federacio, kaj Kuo Su-ĉen, modela arboplantistino en Liaŭŝi-Provinco, Nordorienta Ĉinio.

## Virinoj en Industrio

La altiĝo de la pozicio de virinoj en la industriaj kampoj estas jam grandega, precipe kiam ni konsideras kiel mallonga tempo forpasis post la liberiĝo. En la pasintaj du jaroj, multe pli da virinoj partoprenis en industria laboro. La politika konscio kaj amo al la patrio de virinoj kreskas rapide. Dank' al efikeco kaj inventemo, ili jam atingis brilajn rezultojn precipe en produktaj kampanjoj.

Sin trovas entute 650,000 industriaj laboristinoj en la tuta lando. Virinoj nun havas la oportunun labori en ĉiu kampo. Sufiĉe granda nombro da virinoj jam estas nomita administrantoj aŭ direktoroj de industriaj entreprenoj. Sin trovas inĝenierinoj de lokomotivo, tramdirektistinoj, kondukistinoj de trajno kaj poŝtofistinoj. En fervoja transportado, iuj virinoj zorgas pri trafiko de pasenĝeroj; aliaj estas ĉefkonduktoroj de trajno.

Virinoj jam partoprenis kun la viroj en patriota konkurso-movado tra la tuta lando. En Lia ŭtung-Provinco, Nord-orienta Ĉinio, ekzemple, pli ol 95 procentoj de la laboristinoj partoprenas en konkurso-movadoj. Multaj jam gajnis la honoran titolon de labormodelo pro siaj produktorekordoj. En lastaj novembro kaj decembro, la geŝpinistoj de la tuta lando—el kiuj 60 procentoj estas virinoj—respondis la alvokon de la registaro por sturm-laboristoj por produkti pli da kotonŝpinaĵo. Ili superplenumis la celon. La teksistinoj ankaŭ strebadis por plibonigi siajn teknikojn kaj jam inventis novajn labor-metodojn.

Ekzemple, Ho Ĉien-ŝiu estas modela ŝpinistino de la 6a Ŝtata Kotonŝpinaĵo en Cingtaŭ. Ŝi bone studis la diversajn metodojn uzatajn de siaj kolego-laboristoj, kaj elkreis sciencan labormetodon, kiu malmultigis la rulilkotonon je kvin sesonoj meznombro, kaj dank' al la metodo laboristoj jam povas prizorgi double kiom antaŭe da spindeloj.

Ĉang Ŝu-jun, laboristino en la Hengta-Tobako-Kompanio en Tienzin, inventis progresintan pakad-metodon. Ankaŭ ŝi inventis la metodon per pristudo de la metodoj uzataj de siaj kolegoj.

Tiuj ĉi estas nur du el la multaj virinaj labormodeloj kiuj tiel multe faris por progresigi industriajn produkton. Per tiu laboro por sia lando, ili ankaŭ rimarkeble levis la pozicion de virinoj en ĉina industrio.

### Agrara Reformo kaj Virinaj Rajtoj

Kompreneble, la agrara reformo plej vaste efikis sur la politika, ekonomia, socia kaj hejma pozicio de virinoj kaj, sendube, ankaŭ sur ilia estonteco.

La Leĝo de Agrara Reformo donis al virinoj la rajton esti posedanto de tero—rajton, kiun ili neniam havis en la tuta ĉina historio. La rajto posedi teron nature ŝanĝos la tutan pozicion de virinoj en la kam-

para socio. Antaŭe, la naskiĝo de filino estis konsiderata kiel malfeliĉo por familio. Bofilino estis traktata kiel ĉevalo pro siaj utileco kaj penlaborado kaj la edzo kaj bopatrino povis ŝin insulti, bati kaj eĉ mortigi. Hodiaŭ, virino estas aŭskultata kun respekto pro sia ŝanĝiĝinta pozicio.

Por forskui la katenojn de la pasinteco dekmiloj da kampanoj sin ĵetis entuziasme en la grandan movadon de agrara reformo por aboli feŭdismon. Ili aktive partoprenis en ĉiuj fazoj de detruado de la malamata feŭda sistemo. Ili elmetas en publikaj juĝadoj akuzojn kontraŭ bienuloj, helpas determini la klasdevenon de kamparaj komunum-membroj kaj partoprenas la aktualan distribuon de tero.

Granda nombro da virinoj jam estas elektitaj al respondecaj postenoj en kampanaj asocioj aŭ kiel popolaj reprezentantoj en sia regiono. La agrara reformo ege altigis ilian politikan konscion; ilia praktika patriotismo montrita per ilia entuziasma partopreno en pliigo de agrikultura produkto estas, siavice, profitodona al la tuta lando.

### Postulo de Eduko kaj Kulturo


Plenumo de la agrara reformo, restarigo kaj disvolvo de la nacia ekonomio kaj la stabiligo de varprezoj—ĉiuj ĉi faktoroj kune ebligis grandan bonigon de la ekonomia vivo de la tuta popolo. Kun altiĝanta vivnivelo, la vastaj laborantaj popolamasoj postulas edukon kaj kulturon por si mem kaj siaj infanoj.

Nun sin trovas pli ol 440,000 elementaj lernejoj en nia lando. 81 procentoj de la pli ol 37,000,000 gelernantoj de la elementaj lernejoj estas infanoj de laboristoj kaj kampanoj. Pli ol 1,700,000 gelaboristoj, kaj pli ol 100,000 familianinoj de laboristoj nun lernas en libertempaj lernejoj. Sin trovis 10,000,000 virinoj inter la kampanoj kiuj vizitis vin-

tran lernejon lastjare; kaj 5,000,000 inter la 10,000,000 kampanoj kiuj lernis en regulaj lernejoj. Multaj el tiuj virinoj jam fariĝis modelaj lernantoj.

Ekzemple, Je Feng-ĉen de Ŝanhajo ellernis skribi mallongajn leterojn nur post trimonata lernado. En Suŝien-Gubernio, norda Anhuej-Provinco, 46-jara avino, Hu Zun-ŝiu, fariĝis aktivulino en la kampanjo de vintra lernejo. Ŝi ne nur pene lernadis, sed ankaŭ organizis produkton dum kriza periodo kiam ili suferis malsufiĉecon de manĝaĵo pro neatendita mizera rikolto. Dank' al ŝiaj klopodoj la financaj malfaciloj de la lernejo kaj la familioj de la lernantoj estis konkeritaj. Sekve ŝi estis elektita Speciala Lern-modelo de norda Anhuej-Provinco. La Vintra Lernejo de Tatien-Distrikto, kiu povis persiste iradi dank' al ŝiaj klopodoj, estis renomita la Lernejo de Hu Zun-ŝiu en ŝia honoro.

La du urboj Port-arturo kaj Dajren jam neniigis analfabetecon per grandskalaj edukmovadoj en la lastaj du jaroj. Multaj laboristinoj kaj kampanoj ricevis



**Liang Ŝiu-jing de norda Ŝensi-Provinco estas elektita labormodelo pro sia lerteco en organizado de interhelpaj grupoj.**



oportunojn lernadi en la Ĉina Popola Universitato, en lernejoj de laboristo- kaj kamparano-kadroj, kaj mallongperiodaj mezlernejoj.

## Ŝtata Protekto al Patrino kaj Infano

Aktiva kaj kreiva partopreno de virinoj en la politika, ekonomia kaj kultura vivo de la nacio estas neapartigeble interligita kun ŝtata protekto al patrinoj, bonigo de laborkondiĉoj por laboristinoj, kaj feliĉiga laboro por virinoj kaj infanoj.

La Centra Popola Registaro kaj la Tutĉinia Demokrata Virina Federacio dediĉis grandan atenton al higiena laboro por infanoj kaj patrinoj. Malnovstilaj akuŝistinoj estas retrejnataj, kaj moderna obstetrikio estas enkondukita. Depost liberigo, ĉirkaŭ 100,000 tiaj malnovstilaj akuŝistinoj jam reedukiĝis. Mortprocento de infanoj jam ege reduktiĝis per la fondo de 1,000 sanstacioj por infanoj kaj patrinoj, kaj 10,000 obstetriklaj centroj.

Krome, infanvartejoj stariĝis ĉiuloke. Nun troviĝas 1,227 infanvartejoj organizitaj de fabrikoj, registaraj organizaĵoj, aŭ lernejoj—naŭoble kiom estis antaŭ liberigo. La disvolvado de infanvartejoj kaj vart-ĉambroj en fabrikoj kun grandaj nombroj da laboristinoj estis speciale rapida. Pli ol 500,000 infanoj antaŭlernejaĝaj de laboristoj estas prizorgataj kaj edukataj en taginfanvartejoj.

La principo de laborŝanĝo dum la rikolta sezono donis la eblecon starigi pli ol 10,000 tiajn infanvartejojn tra la lando en 1951. En la kamparo infanvartejoj estas organizataj en kreskantaj nombroj. Nun ekzistas 106-oble kiom da kamparaj infanvartejoj estis en 1950! Tiaj sezonaj infanvartejoj bezonas tre malmultan ekipon. Sed ili havas grandan bonan influon al la entuziasmo kaj efikeco de patrinoj en agrikultura produkto.

Granda atento estas donita ankaŭ al la bonigo de laborkondiĉoj, instalado de sekurigaj rimedoj, al demandoj de higieno kaj eduko por laboristinoj. La kondiĉoj de la Labor-asekura Regularo estas provizitaj en ĉiuj grandaj fabrikoj. Plie, la Ministerio de Laboro jam publikigis provincajn regulojn por la protekto de laboristinoj kaj junaj laboristoj, kaj por kontrolo de laborkondiĉoj en privataj entreprenoj, kaj mezgrandaj kaj malgrandaj fabrikoj.

Kvankam ĉinaj virinoj jam akiris egalecon kun viroj, kaj estas ĝuantaj specialajn prizorgojn, tamen ankoraŭ restas multaj farendaj laboroj por elradiki la eon-malnovan ideologion kiu nutras malrespekton al virinoj en ĉiuj ĝiaj formoj. Eĉ la virinoj mem, pro jarcentoj da obeado kaj rezignacio al sia malalta pozicio en la socia strukturo, kelkiam malhavas la memfidon kaj kuraĝon bezonatajn por daŭrigi sian luktheadon. Sekve, estas nia tasko reeduki ideologie la popolamasojn kaj, precipe, la virinojn, helpi ilin plene uzi siajn nove akiritajn rajtojn.

Dum ankoraŭ okupataj de rekonstruado kaj sanigo el la militaj vundoj, ni devas surŝultrigi la aldonajn ŝarĝojn: la agresmilito de la Usonaj imperiistoj en Koreio devigis la ĉinan popolon lanĉi sian movadon rezisti Usonan agreson kaj helpi Koreion. Tiu ĉi milito, tiel proksima al nia landlimo, neeviteble iom malrapidigas la rapidan bonigon de la vivo de virinoj kaj infanoj. Sed el spertoj ni scias, ke per la penlaborado kaj saĝo de niaj vekigintaj popolamasoj kaj sub la brila gvidado de Prezidanto Maŭ Ze-tung, ni povos konkeri ĉiajn malfacilojn sur nia vojo al venko. La virinoj de Ĉinio jam plene pruvis ke ankaŭ ili decidas laŭiri tiun ĉi vojton.

## Kiel Virinoj Organizas

Filioj de la Demokrata Virina Federacio jam fondiĝis en ĉiuj kvin grandaj administraj regionoj de Ĉinio, unu aŭtonoma nacia regiono, en 28 provincoj 8 specialaj administraj subregionoj kaj 94 municipoj.

Konferencoj de Virinaj Rezentantoj jam estas kunvokitaj, kaj lokaj organizoj de la Demokrata Virina Federacio fondiĝis en 1,731 gubernioj. Tio ĉi signifas ke virinoj en 80% de la gubernioj aŭ egalaj administraj unuoj de la tuta lando jam establis siajn proprajn organizojn.

La nombro de virinoj organizitaj de tiuj ĉi Konferencoj de Rezentantoj estas ĉirkaŭ 76,000,000. Dank' al tiuj konferencoj, ili povas solvi multajn problemojn kolektive kaj efike.

## Virinoj en Konstruado

En la Nordoriento, 100,000 kamparanoj povis labori en fabrikoj kaj minejoj de januaro ĝis junio, 1950, rezulte de la partopreno de virinoj en agrikultura produkto. En la somero de 1951, 70-80% (en kelkaj regionoj eĉ 80-90%) de la kamparaninoj helpis tutkore en agrikultura produkto. Sin trovas traktoristinoj sur stataj farmoj. Triono de la labormodeloj en agrikultura produkto en Ping-juan-Provinco estas virinoj.

En 1950, 650,000 virinoj laboris en akvokonservaj konstruejoj laŭlonge de la Granda Kanalo, la Jangze-Rivero, la Flava Rivero kaj Ji-Rivero. En 1951, pli ol 250,000 virinoj partoprenis en la subjugado de la Huaj-Rivero. Pli ol 1,300,000 aliaj aliĝis al interhelpaj grupoj, kaj ekprenis la plugilon post kiam iliaj edzoj iris labori sur la digoj.

## Virinoj por Paco

En 1951, pli ol dudek milionoj da virinoj en 310 urboj, 700 urbetoj kaj 600 vilaĝoj de Ĉinio partoprenis demonstraciojn kontraŭ Usona agreso en Koreio kaj la rearma de Japanio fare de Usono.

Okdek procentoj de la kamparaninoj en Nordorienta Ĉinio kaj pli ol 90 procentoj de la virinoj en Tienzin (nombranta ĉirkaŭ 580,000) subskribis la petskribojn por Pacpacto de la Kvin Potencoj kaj kontraŭ la rearma de Japanio.



**Ĉen Jun, instruistino por 34 jaroj en la 2a Elementa Lernejo de la Pekina Instruista Kolegio, estas ankaŭ komitatano de la Pekina Municpala Popola Registaro.**

# Ŝinkang—Nova Haveno de Ĉinio

Jeh Ĉoŭ

Grandioza pordego de Norda Ĉinio estas konstruata 50 kilometrojn for de Tienzino, la plej granda industria urbo Nordĉinia. La nova artefarita haveno, lokita ĝuste ekster Taku-Haveno en Pohaj-Golfo, estos unu el la plej grandaj ŝirmitaj havenoj de la mondo, etendiĝante 18 kvadratajn kilometrojn enfermitajn de moleoj. Ĉi tie en la profunda akvo de la homfarita ankreo oceane veturantaj ŝipoj ĝis 10,000-tunoj kunportantaj la komercon de Ĉinio kaj la amikaj landoj de la mondo povos elŝipigi siajn gravajn kargojn rekte sur vagonarojn.

Ŝinkang, aŭ "Nova Haveno" kiel la projekto estas nomata, ne nur konformiĝos al la bezonoj de la disvolviĝante eksterlanda komerco de Ĉinio; je la fino de 1952 kian la unua stadio de ĉi tiu grandega projekto estos kompletigita, la transporta pago por ĉiu miliono da tunoj malpliĝos je 160 miliardoj da juanoj. Nuntempe nur trimiltunaj vaporŝipoj povas vojaĝi supren laŭlonge de la malprofunda Hajho-Rivero kiu ligas Tienzinson kun la maro. Ĉiuj pli grandaj ŝipoj devas ankri kelkajn mejlojn for de Taku kaj siajn kargojn transportigi per barĝoj ĝis Tienzino.

Mi vizitis Ŝinkang nur du monatojn post kiam la decido konstrui ĉi tiun plej novan el la grandiozaj projektoj de nova Ĉinio estis farita de la registaro. Ĉi tie el la ruinaĵoj kaŭzitaj de Kuomintanga sabotado estas leviĝantaj novaj varfoj, vartenejoj kaj fervojaj linioj. Kiam la Kuomintangaj perfiduloj forkuris, ili subakvigis la ŝipojn en la haveno, bruligis la domojn kaj detruis la maŝinojn de la ŝipkonstruejo.

La taskoj kiuj frontis kontraŭ la ĉinaj inĝenieroj ŝajnis nesupereblaj. Apenaŭ troviĝis spertaj haveninĝenieroj ĉinaj, ĉar antaŭ la liberigo nur fremdaj inĝenieroj estis dungitaj ĉe la haveno, kiuj forkuris kune kun siaj Kuomintangaj superuloj.

La plano de la Popola Registaro postulis titanan klopodon. Navigeblaj fluejoj devas esti pliprofundigitaj kaj multaj kilometroj da maro transformitaj en teron. La konstruado de la haveno kaj ĝiaj longaj moleoj postulas grandan kvanton da granito, cemento, fero kaj ŝtalo. Ĉio ĉi tio signifas multege da zorgema esplorado, planado kaj organizado. Detalaj marmezurado kaj marsondadoj devas esti faritaj por determini la naturon, direkton kaj rapidecon de la vento, marfluoj kaj aliaj tajdaj fenomenoj.

Por plibonigi la fluejon, 12,700,000 kubaj metroj da tero devas esti transportitaj el la marlito. Ĉi tio estos siavice uzita por repreni de la maro kvar kubajn kilometrojn kiel ejo por la novaj varfoj kaj aliaj konstruaĵoj. Miliono da tunoj da granito devas esti ĵetitaj en la maron por formi la rubfundamentojn por la moleoj. Kiam mi estis tie, 1,300,000 tunoj estis jam metitaj sur la marliton. Por havigi al vi ideon pri la grandeco de ĉi tiu laboro, mi citu ke ĝi bezonis 15,000 ŝarĝvagonojn por ŝuti ĉi tiun kvanton en la maron.

Sed la laboristoj kaj inĝenieroj estis neniel timigitaj de la tasko kiun ili sur sin prenis; ili ne nur ek-

komencis la laboron, sed eĉ jam finis la 1951-planon kaj duonon monatojn pli frue ol laŭ la temptabelo. Novaj rekordoj estas ĉiutage starigataj. Vicdirektoro Ĉoŭ Lun de la Ŝinkang Inĝeniera Buroo montris al mi faskon da ĉiutagaj raportoj. "Ne nur ni jam superis la rekordojn de Kuomintang kaj la japanoj, sed niaj hodiaŭaj novaj rekordoj estos tro konservativaj por niaj morgaŭaj uzoj. Imagu por vi mem kiel ni estas progresantaj en nia laboro!"

Post 50-minuta intervjuo kun Direktoro Ĉoŭ, mi iris al la konstruejo por interparoli kun la laboristoj. Mi renkontis Se Ĉing-kuej, juna laboristo kun sana sunbrunigita vizaĝo. Li estis la unua kiu defiis la aliajn laboristojn por venki siajn malfacilaĵojn per konkuradoj. Se estas la estro de iu dragista teamo. Tuj post la "mobiliza" kunveno en kiu la planoj por 1951 kaj 1952 estis anoncigitaj, la teamo de Se okazigis kunsidon por diskuti kiel ili povos plenumi sian parton de la plano. Ili decidis defii aliajn teamojn pri konkurso por plirapidigi la dragadon.

Laŭ la pasintaj rekordoj, ĉiu tiaspeca dragmaŝino povas elskrapi nur ĉirkaŭ 300 kubmetrojn da ŝlimo ĉiuhore. Sed la laboristoj ĵuris levi ĝin ĝis 350. Tamen kiam ili eklaboris, ili trovis ke ili povas ankoraŭ plibonigi siajn metodojn. Ili interŝanĝis spertojn kun aliaj konkurantaj teamoj kaj tuj novaj rekordoj estis starigataj. Anstataŭ la antaŭe fiksita 350-kubmetra celtabulo, la dragistaj teamoj komencis tuŝi la antaŭe neniam prisonĝitan ciferon de 570 kubaj metroj ĉiuhore! Ĝi estis la rekordo je la tempo de mia vizito, nur du semajnojn post kiam la konkurso komenciĝis!

Tra la konstruejo rapide disvastiĝis populara movado por disrompi malnovajn rekordojn, inkludante ĉiun laborejon, laboriston kaj inĝenieron. Pluaj plibonigoj estis farataj dum la sekvantaj entuziasmaj konkursoj.

Plibonigoj estas farataj efektive ĉiutage. Pluraj laborherooj kaj labormodeloj estas elektitaj de siaj laboristo-kolegoj kaj premiitaj de la administracio.

Kompreneble la plibonigoj en la laboro kaj la rapideco de plenumado estas ne nur pro la laboristoj. Grandaj kontribuoj al la plibonigoj de la labormetodoj estas alportitaj al Ŝinkang de la progresintaj Sovetiaj tekniko kaj riĉaj spertoj en ĉi tia konstruado. Inĝenieroj kaj teknikistoj en la laborado estas instruitaj kiel forlasi la postigintan burĝan teknologion. Unu ekzemplo sufiĉas por tion klarigi. Oni planis etendi unu el la varfoj por ke ĝi ricevu ŝipojn de 10,000 tunoj. Laŭ la normaj burĝaj lernolibroj de inĝenierscienco, tia projekto bezonus plifortikigon ĉe la betonaj fundamentoj. Tio bezonus miliardojn da juanoj. Iu Sovetia specialisto faris zorgoplenan esploron kaj konstatis ke la fundamentoj estas sufiĉaj por subteni la pligrandigitan tunkvanton. Tiamaniere ne nur nenecesa elspezo estis ŝparita, sed la laboro estis ankaŭ kompletigita laŭ la temptabelo.



Nun la kreemo kaj ingenio de la liberigitaj laboristoj ne plu nin mirigas, sed mi volis scii kiel la laboristoj mem pensas pri tio.

“Kial ne? Ĉu ni ne estas konstruantaj nian Patrion kaj laborantaj por ni mem?” estis la respondo de Se Ĉing-kuej kiam mi demandis lin kial la laboristoj fariĝis tiel kreemaj.

“Ni estis ĉiam malestimataj kaj vivis kiel hundoj en la pasinteco, sed nun ni havas bonan vivon. Ni estas la veraj mastroj de nia lando nun. Estas neeble por iu ajn ne kortusiĝi de ĉiuj ĉi ŝanĝoj. Hodiaŭ ni havas ĉian motivon por uzi tiel nian cerbon kiel niajn muskolojn.”

Ĉe Ŝinkang troviĝas multaj personoj kiel Se, kiuj estas konsciaj pri sia libera kaj feliĉa vivo kaj plenaj je energio kaj entuziasmo por la konstruado de pli riĉa nuntempo kaj estonto.

Mi vidis vicon da novaj, belaspektaj domoj konstruitaj el ruĝaj brikoj. Ili estas la novaj hejmoj de la laboristoj.

La administracio jam transloĝigis multajn laboristojn el iliaj nestosimilaj kabanoj. La prezidanto de la havena sindikato fiere montris al mi la novajn manĝejojn, banĉambrojn kaj la klubdomon. Por la amuzo de la laboristoj, la sindikato organizis dramotrupojn kaj muzikbandon. En vesperoj sabataj kaj aliaj libertagoj, la laboristoj kaj iliaj familianoj sin amuzas per filmoj, dramoj, koncertoj kaj dancoj.

La sindikato ankaŭ prizorgas ke la kultura nivelo de la laboristoj estu levita. Kvin tagojn ĉiusemajne la laboristoj vizitas vesperlernejon. Multaj laboristoj

kiuj ne povis skribi siajn nomojn nun kapablas skribi leterojn kaj eĉ mallongajn artikolojn por tagjurnaloj. Ĉiutage dum la ripozo la laboristoj formas malgrandajn grupojn por legi ĵurnalojn. Post la legado sekvas viglaj diskutoj pri l' kurantaj eventoj.

Teknika trejnado estas prirespondata de speciala komitato kiu kontrolas klasojn de matematiko, fiziko kaj aliaj teoriaj kursoj kune kun praktika, profesia trejnado. Precipe la junaj laboristoj lernas rapide. Sub la malnova sistemo, ili devis servi kiel metilernanto por tri jaroj en la laborejo, sed nun dank' al zorgema gvidado de spertaj laboristoj ili ellernas la ĝustan teknikon en kelkaj monatoj. La kazo de la 18-jara knabino Li Ŝu-ŝia, kiu fariĝis lerta tornistino en du monatoj, estas tre elstara ekzemplo de ĉi tia rapida akiro de scio.

La politika konscio, energio, lernemo, kaj lojala sindono al la gvidado de la Komunista Partio tiel rimarkindaj en Ŝinkang estas reprezentantaj por ĉiuj tiaj projektoj en Ĉinio hodiaŭ. Ili klarigas la rapidecon de progreso kaj la grandajn ŝanĝojn kiuj estas okazantaj en Ĉinio. Kiam mi estis forlasanta Ŝinkang inter la tintanta muziko de la konstruado, mi ĵetis mian lastan rigardon al la vidaĵo ĉe la horizonto rompita de la vaporŝipoj ankrantaj fore kaj proksime. La restajo de Taku-Fortikaĵo, detruita de imperiistaj armeoj en 1900, kaptis mian okulon. Sed la fortikaĵo estas ne plu soleca kaj forlasita; en la akvo sur kiu ĝi staradis kiel silenta kaj senpova gardisto, kreskadas Ŝinkang—la respondo de laboristoj al la mortanta provoko de imperiismo.

Tradukita de Cipao Nin

## Haltu, Sangsoifaj Krimuloj!

(daŭrigo de p. 28)

malhoma rimedo de bakteria milito. Ili estas ankoraŭ detruo kaj okupo de la tuta Koreio kiel salttabulo por pensantaj ne nur pri pliaj aventuroj sur la korea fronto, sed ankaŭ pri disvastigo de la agreso en Koreio, kaj lanĉi novan militon.

Ni devas averti la Usonajn agresantojn ke ili estos respondecaj por ĉiuj konsekvencoj de la uzado de bakteria militilo, la plej terura krimo plue farita de ili kontraŭ civilizacio. Ilia netolerebla obstrukco al la armistica intertraktado kaj ilia uzo de tiu ĉi fia armilo dum la intertraktado pruvas, ke ili estas la plej venenaj malamikoj de la popolaj aspiroj por paco. Ili estas sin metantaj tagon post tago en la pozicion de tutmonda malamiko kaj nepre estos por ĉiam kondamnita de la homaro.

Ni alvokas al tiuj inter la Usonaj trupoj en Koreio kiuj estas trompita kaj ankoraŭ konservantaj grajnon da konscienco—ĉu usonanoj, britoj, francoj, turkoj, aŭstralianoj aŭ alinacianoj, ekrigardi al la abomena krimago kiun la Usonaj agresantoj faras, rekoni ke tiu ĉi krimo de amasbuĉado estas nepardonebla, starigi kaj rifuzi partopreni ĝin, kontraŭstari tiun ĉi krimagon kaj rifuzi fordoni plu siajn vivojn vane por la krimaj planoj de la Usonaj agresantoj.

Estas tute sendube, ke la planoj de la Usonaj agresantoj malsukcesos, iliaj malesperaj entreprenoj estos senfruktaj. Bakteria milito ne povos ilin savi el ilia malvenko same kiel ilia tiel nomata mar- kaj aer-forta

“supereco” kaj ĉiuj iliaj aliaj armiloj. Ĝi nur incitos al la justamaj popoloj pli grandan koleron kaj stimulos la koreajn kaj ĉinajn popolajn fortojn al pli granda heroismo. Alia rezulto ne estos ebla. La heroaj koreaj kaj ĉinaj batalantoj sendube forte draŝados la agre-santojn ĝis ili volonte akceptos justan kaj racian armisticon.

Ni alvokas al ĉiuj pacamaj popoloj tra la tuta mondo tuj sin mobilizi pro civilizacio kaj justeco kaj haltigi la teruran krimagon de la Usonaj agreantoj grandskale uzi bakterian militilon en Koreio. La tuta homaro havas rajton postuli ke Usono ĉesigu sian sangsoifan, monstran detruadon de la internaciaj konvencioj kaj siajn krimagojn kontraŭ la homaro. Ni tutkore subtenas la apelacion de la dua sesio de la Monda Pacokonsilo al la Unuigitaj Nacioj, kiu reprezentis la postulon de miliono da homoj en la mondo, senkondiĉe malpermesi al uzado de ĉiuj specoj de atomaj, bakteriaj kaj hemiaj armiloj, venengasoj, radiemanigaj armiloj kaj ĉiuj aliaj rimedoj de amas-ekstermo; kaj proklami militkrima la registaron kiu la unua ilin ekuzas. Ni nepre tenos la Usonajn agre-santojn tute respondecaj por ĉiuj iliaj krimoj faritaj en Koreio. Se la Usonaj agresantoj ne ĉesigos siajn maniajn, barbarajn krimagojn, ili nepre portos ĉiujn konsekvencojn de la krimagoj. Ni, la popolo de Ĉinio kaj la popoloj tra la tuta mondo, donos ankoraŭ pli aktivan subtenon al la Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj, kaj agos firmdecide kaj efike por frakasi ĉiujn krimajn planojn de la Usonaj agre-santoj.

Trad. Laŭlum

# VIZITO AL KUEJLIN-VILAĜO

— Tang Seng —

Kiam mi atingis Kuejlin-Vilaĝon en Nordorienta Ĉinio, mia kamparano-gastiganto Maljunulo Taŭ varme min akceptis kaj tuj ekparolis al mi pri la loko. Li pensis, ke se mi intencas priskribi pri la popolanoj en produktado, mi devas almenaŭ interparoli kun s-rino Kin Na, maljuna gvidantino de la virina interhempa grupo, kaj 83-jara Ĉu Kuo-fu.

Antaŭ ol mi faris ion ajn, mi vizitis la vilaĝestron. Liaj du malgrandaj ĉambroj estis plenplenaj de homoj, kiuj venis por akiri siajn porciojn de diversaj semoj kaj hemiaĵoj. La sekretario sin okupis per mezurado kaj registrado de la kvanto prenita de ĉiu homo. Mi petis intervidon kun la vilaĝestro, sed informiĝis, ke estas neeble vidi lin antaŭ la vesperiĝo. Li estis okupata, laborante aŭ en sia aŭ en alies kampoj. Oni neniam sciis, kie li estas helpe laboranta.

Mi urĝe deziris interparoli kun la sekretario, tial mi ekhelpis rapidigi la laboron per registro de la aĵoj. Post kiam la lasta homo de homamaso foriris, mi prezentis min mem al la sekretario. Li estis tre afabla homo, sed antaŭ ol mi povis trovi la ŝancon multe paroli kun li, li jam diris, ke li devas rapidi al la kooperativo por akiri pli da koton- kaj kanab-semoj. Li promesis min viziti pli poste. Nun mi restis sola en la du senhomaj ĉambroj, sekve mi decidis viziti al s-rino Kin Na.

S-rino Kin Na loĝis tre malproksime kaj irinte ne longe mi perdis la vojon. Troviĝis neniu iranto apude por montri al mi kie ŝin trovi. Finfine mi vidis knabon kaj mi lin demandis. "Ne, neniu nomiĝas Kin Na," li certigis. Kiam mi persistis, li diris, "Se vi ne kredas, mi povas reciti ĉiujn nomojn en la vilaĝo, de barbuloj ĝis novnaskitoj."

Ĝuste tiam lia fratino aperis kaj riproĉis lin pro lia prokrasto sendi la akiritajn kanab-semojn al la patro kiu jam atendis en la kampoj. Mi plufoje pride- mandis pri s-rino Kin Na. La knabino ankaŭ skuis sian kapon. Mi diris al ŝi ke ŝi estas la gvidantino de la virina interhempa grupo.

"Oh, la gvidantino de la virina interhempa grupo!" Ŝi ekkriis. "Kial vi ne tiel diris unue? Nun ŝi laboras en la fruktĝardeno. Mi montros al vi la vojon."

Kiam ni kuniris sur la vojo, la knabo faris malstrik- tan nodon per sia viŝtuko kaj fiksitis ĝin al sia brusto.

"Mi estas la labor-heroo kiu gajnis brilan floran," li kantis.

Lia fratino diris al mi, ke troviĝas granda nombro da labor-herooj en la vilaĝo. Virinoj pruvas sin same bonaj laborantoj kiel la viroj. En la vilaĝo ankaŭ estas la unua virina gvidanto, Taŭ Kuej-lien, vidvino de martiro en la Liberiga Milito. Ŝi sukcesis gvidi paron da impulsigemaj junuloj, kiuj kapablas bone labori, sed samtempe estas famaĉaj pro sia feroa temperamento. La vilaĝanoj elektis ŝin sia reprezentanto al la distrikta konferenco.

Irinte mallongan distanco, miaj amiketoj montris al mi la vojon al la fruktĝardeno. Kiam mi trairis tra la kampoj, mi subite aŭdis gajan ridadon. Grupo da virinoj ripozis sub la arboj.

Mi estis ĝoja, ke ili ne estis laborantaj. Sed antaŭ ol mi ilin atingis, la ripoza periodo jam finiĝis kaj ili disiris. Ĉiu laboris laŭ sulko inter la arboj kaj verŝajne ili estis en konkurso. Mi silente staris apude kaj rigardadis. Estis sep junaj virinoj kaj unu maljunulino de ĉirkaŭ kvindek jaroj—evidente s-rino Kin Na mem.

Mi jam informiĝis de Maljunulo Taŭ ke tiuj ĉi virinoj estas el tri familioj, kiuj ricevis siajn porciojn de tero en la agrara reformo. Ili rikoltis nenion last- jare, ĉar la inundo forlavis la grenkreskaĵojn. Spertinte la samon, ili ofte kunvenis por diskuti siajn problemojn.

Iun tagon, Kin Na diris: "Ni estas ok homoj ĉi tie. Ni jam travivis jardekojn da malfacila vivo. Ni ne estos venkitaj nun. Kial ne sendi niajn virojn al la fabrikoj en la urbo por akiri monon por manĝaĵoj? Ni povas formi virinan grupon por plenumi la kampla- boron hejme. Vi vidas, ke la viraj grupoj jam estas sukcesaj."

Ĉiuj aprobis tion. La viroj iris labori en la urbo Anŝan kaj la virinoj mem grupiĝis por kulturi 84 muoj da tero. Kin Na estis elektita la gvidantino kaj du knabinoj, kiuj kapablas kalkuli, estis elektitaj por prizorgi la kontojn.

La plej juna laboranto estis knabino dekkelkjara. Mi povis vidi ke ŝi estas bona laboranto. Ŝiaj manoj estis kvazaŭ flugantaj supren kaj malsupren kiam ŝi fosis la teron. Tre baldaŭ, ŝi jam estis antaŭ ĉiuj aliaj. Ŝin sekvis s-rino Kin Na mem. Kin pensis ke ŝi estis la plej rapida, kaj ne levinte sian kapon ŝi diris, "Kuejjunjo, mi lasos vin malantaŭe! Rapidu!"

La knabino ne respondis sed fosis eĉ pli rapide. Fininte sian sulkon ŝi senhalte iris al tiu de s-rino Kin kaj fosis en la kontraŭa direkto. Kiam la duopo preskaŭ interkoliziis, ŝi rektiĝis kaj kun afektita miro kriis: "Ho, ho, kiel fariĝis ke mi iras eraran direkton!"

Ĉiu rigardis supren kaj ekridis. La maljunulino kontrolis la laboron laŭ la sulko de la knabino por certigi ĉu ŝi ne oferis kvaliton por rapideco kaj poste deklaris Kuej-junon la venkinto. Mi atendis ĝis kiam ili finis ĉiujn sulkojn kaj aliris por min mem prezenti. S-rino Kin estis tre amika kaj modeste refutis mian laŭdon pri ŝia grupo. Ŝi sugestis al la grupo ke ili iru al la orienta fruktĝardeno por fini la laboron antaŭ ol la tago finiĝos. Ĉiu aprobis kaj ili foriris ĝoje kaj energie.

Postlasite sola, mi piediris tra la kampoj malrapide. Verŝajne neniu havis tempon por staradi kaj interparoli kun mi. Vivo bolas en la vilaĝo. Mi pensis ke mia tempo estis tre kara ĉar mi povis resti tie nur unu tagon, sed mi trovis ke mi estas la homo kun la plej malmulto por fari. La suno estis subiranta kiam mi malrapide iris en la direkto de mia loĝejo. Antaŭ mi iris mal- junulo, tial mi tuj proksimiĝis al li per rapidigitaj paŝoj. Atinginte lin mi aŭdis lin subridanta al si mem.

"Pri kio vi laboris hodiaŭ, Oĉjo?" mi demandis.

"Plantis muon da melono," respondis li ĝoje. Liaj vangharoj, haroj, kaj brovoj estis neĝblankaj, sed lia korpo estis facilmova kaj forta. Mi taksis ke lia aĝo estas ĉirkaŭ sepdek jaroj, sed li skuis la kapon



kaj diris kun trembrilo en la okuloj, "Tio estas pli proksima al la aĝo de mia filo ol la mia." Mi demandis kial li ĝenas sin irante al la kampoj je tia aĝo.

"Mi sentas min ĝoja laborante kun la interhelpa grupo," li respondis, "ne pro tio ke mi povas fari mult-multe sur la kampoj—sed tio ne gravas. Mi ŝatas esti kun la grupo. Tio estas amuza! Tia ĝojo ebligas al mi vivi pluajn jarojn." Vere, li ŝajnis ĝoja, kontenta homo. Mi volis scii ĉu la subridado signifas superfluan de ĝojo. Aŭdinte mian demandon la maljuna kamparano denove ekridegis.

"Ne," li diris, "mi pensis pri la junuloj kaj ilia mirego kiam mi venkis en la melon-planta konkurso hodiaŭ. Ho, se vi estus vidinta iliajn vizaĝojn. Vidu, ili konkuras inter si en preskaŭ ĉiu laboro surkampa, kaj hodiaŭ por la unua fojo mi petis partoprenon en la konkurso.

"Kio?" ili eksaltis. "Konkursi kun vi? Kion oni dirus al ni pro venko super okdekjara maljunulo? Ho, ne, ni ne volas!" Sed kiam mi demandis ĉu ili timas esti hontigita se maljunulo ilin superus, ili eksentis tiom da indigno ke ili konsentis al mia partopreno.

"En ordinara laboro kiu bezonas forton, eble mi ne povas konkursi, sed melonplantado bezonas iom da lerteco. Ĉu vi scias, mi finis la tutan terpecon kiun mi devis planti longe antaŭ ol ili finis la siajn. Kaj kion vi pensas? Ili rifuzis konfesi la malsukceson kaj grupiĝis por diskuto, post kio ni havis alian konkurson. Ankoraŭfoje ili ne povis min venki. He, he, ĉu vi ne pensas ke mi havas kaŭzon por esti ĝoja kiam mi jam superis ĉiujn junulojn en mia grupo?" Antaŭ ol ni adiaŭis unu la alian, mi petis sciigon de lia nomo. Li respondis, "Ĉu Kuo-fu."

En la vespero mi diris al maljunulo Taŭ, "Mi sufiĉe respektas la maljunulojn, sed kial vi ne menciis iujn junulojn por ke mi ilin intervjuu?" Li respondis, ke estas pro tio ke la plejparto de la homoj en la vilaĝo pene laboras de sunleviĝo ĝis sunsubiro kaj estas malfacile selekti iujn apartajn junulojn.

Tiam la sekretario de la Vilaĝa Oficejo venis por min vidi. Li pardonpetis por la vilaĝestro, kiu ne povis veni ĉar produktafero irigis lin al la Distrikta Oficejo, sed la sekretario bonvolis min helpi laŭeble. Mi petis lin rakonti al mi ion pri la vilaĝo. Li pripensis momente, kaj poste petoleme demandis ĉu mi volus aŭskulti pri la "Maljuna Obstinulo." Tiam la buŝo de mia dommastro ektiriĝis spasme ĉe la anguloj. Li ridetaĉis honteme.

"Li tro fidis al sia sesdekjara sperto en terkulturo kaj fariĝis obstinulo," diris la sekretario, montrante al Maljunulo Taŭ. Taŭ estis unu el tiuj, al kiuj la vilaĝestro sin turnis por fondi interhelpan grupon, sed li estis neniam interesata.

"Ŝparu vian spiron kaj ne ĝenu la vilaĝanojn. Tiuj novaj ideoj ja ne estas efektivigeblaj," li diris.

Sekve, interhelpaj grupoj estis fonditaj sen la partopreno de Taŭ. Kiam ili komencis akiri bonajn rezultatojn, Maljunulo Taŭ fariĝis envia, sed li hontis diri ke li deziras partopreni. Kvankam la vilaĝestro ankoraŭfoje petis lin partopreni en sian grupon, li estis tro ĉagrenita de sia propra eraro por akcepti la peton. Finfine, ekvidante ke li estus forlasita se li ne iniciatus, li partoprenis la interhelpan grupon sub la gvido de sia nevo.

Kiam la sekretario finis, li demandis maljunulon Taŭ, "Ĉu mi ne diris la veron?"

Mia dommastro kapjesis, sed poste li refute demandis, "Ĉu tio estas ĉio? Vi ne scias la tuton. Ĉu vi scias kiom da ĥemiaĵo mi miksis lastatempe kun miaj semoj?"

"Certe, mi havas ĉiujn ciferojn ĉi tie," respondis la sekretario. Li ŝovis sian manon en la poŝon por la notlibro, sed ne eltirinte ĝin, li daŭrigis, "Mi memoras nun, vi plantis ses litrojn da tritiksemoj kaj prenis ses litrojn da ĥemiaĵo, do ĉiom da semoj vi miksis kun ĥemiaĵo."

"Erare," diris Maljunulo Taŭ. "Maljuna obstinulo estas malfacile konvinkebla. Mi ne komprenis la kialon miksi ĥemiaĵon kun la semoj. Mi ankaŭ ne volis disputi, mi nur miris. Tial, antaŭ la plantado, mi nur miksis duonon de la semoj kun ĥemiaĵo. Ĉu vi scias, la junaj vegetaĵoj el la semoj kunmiksitaj kun ĥemiaĵo nun kreskas fortaj kaj malhele verdaj, sed la alia duono kreskas tre malfortaj kaj palaj. Nun, vidinte la rezulton, mi ja estas konvinkita. De nun mi ĉiam sekvos pli bonajn farmmetodojn. Do, vi devas ŝanĝi la ciferojn en via notlibro."

"Vi maljuna obstinulo, mi eĉ ne suspektis tion!" La sekretario enskribis la novajn ciferojn en sian malgrandan notlibron. Turniĝinte al mi, li diris, "Tamen ne estu erare impresita, kamarado, Maljunulo Taŭ estas ĉi tie mirinda laboranto. Estas malfacile lin konvinki, sed kiam li jam vidas la ĝustan vojon, li laboras pli bone ol iu ajn. Mi neniam miros se li estos elektita laborheroo ĉi tiun aŭtunon."

Kiam ni enlitiĝis, jam estis malfrue en la nokto. La sekvintan matenon mi forlasis kun bonega impresio pri Kuejlin-Vilaĝo—nur ordinara vilaĝeto, sed loko kie rido kaj gajaj voĉoj sonoras la tutan tagon kaj la popolanoj estas la plej okupataj, ĝojaj kaj afablaj kiajn mi neniam antaŭe renkontis.

Trad. Censinio



Unu el la interhelpaj laborgrupoj de kamparaninoj en Ŝantung-Provinco.

# Kulturaj Rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio

Dum la pasintaj du jaroj vigla kultura interŝanĝo disvolviĝis inter nova Ĉinio kaj Sovetunio plifortigante la amikecon kaj unuiĝon por paco inter la du landoj.

En januaro la kinejoj en Pekino kaj multaj aliaj urboj estis plenaj de homoj kiuj avide kaj kortuŝite rigardis la grandiozan filmon: "Lenin en 1918". Tiu estas unu el la pli ol 90 Sovetiaj filmoj montritaj en nova Ĉinio dum la du lastaj jaroj. Krome prezentiĝis ankaŭ mallongaj edukaj filmoj pri diversaj temoj kiel "La Unua Aeroplano" kaj "Higieno de Infanoj."

Komunaj klopodoj fare de Ĉinio kaj Sovetunio en la kampo de filmo alportis riĉegan frukton. La kunlaboro inter la ĉinaj kaj Sovetiaj film-laborantoj pri la filmoj gajnintaj Stalin-premiojn, "Triumfo de la Ĉina Popolo" kaj "Liberigita Ĉinio" rezultigis grandan plialtigon de la kvalitoj de ĉinaj filmartistoj kaj laborantoj.

Jam pli ol 150,000,000 homoj en Ĉinio vidis Sovetiajn filmojn en la pasinta jaro. Dum la sama periodo ĉinaj filmoj kun ruslingvaj dialogoj kiel "La Filinoj de Ĉinio", "La Blankhara Knabino", "La Granda Unuiĝo de la Ĉina Popolo" kaj aliaj estis vaste montrataj en Sovetunio.

Tio estas nur parto de la metodo de la du landoj por efektiviĝi la celon de la Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo "disvolviĝi kaj plifirmigi la ekonomiajn kaj kulturajn rilatojn inter Ĉinio kaj Sovetunio." (Artikolo 52).

La unuaj semoj de la nova kaj floranta kultura amikeco estis dismetataj kiam la Sovetia delegacio de kulturaj kaj sciencaj laborantoj alvenis por la inaŭguro de la Popola Respubliko de Ĉinio. Depost tiu tempo 23 vizitojn faris la Sovetiaj kulturaj grupoj kaj unuarangaj gvidantoj. Inter la 14 ĉinaj delegacioj al Sovetunio kiuj konsistis el reprezentantoj de la plej diversaj kulturaj kampoj la plej freŝdata estas la verkista grupo estrata de Feng Ŝjue-feng. Ĉiu el tiuj vizitoj alportis fruktdonan interŝanĝon de spertoj kaj pliprofundigis la reciprokan komprenon inter la du popoloj pere de

kunvenoj, vojaĝoj, art-prezentado, artikoloj kaj paroladoj.

Krom tiuj mallongaj vizitoj, multaj Sovetiaj specialistoj en diversaj kulturaj kampoj pli longe restadis en Ĉinio farante paroladojn en universitatoj kaj al grandaj grupoj da profesiaj fakuloj.

La tradukoj de Sovetiaj eldonaĵoj trovis milionojn da entuziasmaj ĉinaj legantoj. La plej gravaj verkoj de Lenin kaj Stalin kies tradukoj estas jam haveblaj konsistigas parton de la bazo de ĉiuj politikaj studoj. Rilate la fikciojn la tradukoj de 727 Sovetiaj libroj aperis en librejoj dum la pasintaj du jaroj. Tio signifas ke preskaŭ ĉiuj verkoj gajnintaj Stalin-premiojn estas jam tradukitaj en la ĉinan lingvon. Samtempe la ĉinaj legantoj ankaŭ familiariĝas kun rusaj klasikaj verkistoj—Puŝkin, Lermontov, Gogol, Tolstoj, Turgenev, Ĉeĥov kaj multaj aliaj. Inter la modernaj literaturaĵoj "La Fera Torento" de Serafimoviĉ, "Kiel la Ŝtalo Hardiĝis" de Nikolao Ostrovskij kaj aliaj troviĝas ne nur en kompletaj tradukoj sed ankaŭ en mallongigitaj popularaj eldonoj por legantoj sur malsamaj kultur-niveletoj. "Tagoj kaj Noktoj" de Semonov, "Ĉielarko" de Vanda Vasilevskaja kaj "Ĉapajev" de Furmanov estas krome reverkitaj en ilustritajn rakonto-libretojn kiuj estas multe konataj kaj amataj de junaj legantoj.

Ankaŭ aperis multaj Sovetiaj tradukoj de ĉinaj libroj. "Pri Praktiko" de Maŭ Ze-tung, "Internaciismo kaj Naciismo" de Liu Ŝaŭ-ĉi, la "Komuna Programo", kaj verkoj pri ĉi-epoka ĉina historio sin trovas inter tiuj libroj presitaj en rusa kaj aliaj lingvoj de Sovetunio. Koncerne la literaturon de nova Ĉinio la ruslingvaj eldonoj de la verkoj de Ting Ling, Ĉaŭ Ŝu-li kaj Caŭ Ming kiel ankaŭ "La tri Senrivalaj Bravuloj" de Liu Be-ju, "Uragano" de Ĉoŭ Li-po, "En la Ljuliang-Montaro" de Ma Feng kaj Ŝi Jung, "La Kanto de la Ruĝa Flago" de Lu Mej, "Novaj Herooj kaj Heroinoj" de Kung Ĉjue kaj Juan Ĉing kaj multaj traktatoj kaj komentarioj de Lu Sin estas varme bonvenigitaj en Sovetunio.

Ni informiĝas ke niaj ruslingvaj gazetoj, "Popola Ĉinio", "Ĉinio en Bildoj" kaj "Ĉina Laboristo" estas tiel serĉataj en la Sovetiaj libro-budoj kiel la plej freŝaj numeroj de la ilustrita gazeto "Sovetunio" en Ĉinio. Sovetiaj sciencaj kaj teknikaj verkoj originalaj kaj tradukitaj estas avide studataj en ĉiu ĉina edukcentro.

Ekspozicioj ankaŭ ludis gravan rolon rilate al kultura interŝanĝo. Kelkaj grandaj ekspozicioj okazis memore al la vivo kaj laboro de Lenin kaj la 70a naskiĝ-tago de Stalin. Ekspozicio pri Sovetiaj afiŝoj kaj karikaturoj havis grandan influon sur ĉinajn artistojn. Multe da malgrandaj kaj moveblaj ekspozicioj estas aranĝitaj en popolaj kluboj, fabrikoj, lernejoj kaj vendejo-fenestroj. En Sovetunio, en Moskvo kaj Leningrado, la granda Ĉina Arto-Ekspozicio allogis 300,000 homojn en malpli ol du monatoj.

La Sovetiaj teatraĵoj fortege influas la disvolvon de la nova ĉina realista teatro. "La Malvarma Milito", "La Rusa Problemo", "Kiel la Ŝtalo Hardiĝis" kaj "Tanja" prezentiĝis en homplenaj domegoj. "La Voĉo de Usona Popolo" fariĝis efika propagandilo dum la kampanjo rezisti Usonon kaj helpi Koreion.

Ankaŭ kantoj interŝanĝiĝas inter niaj du landoj. "La Kanto de Stalin", "La Marŝo de la Monda Demokrata Junularo" kaj "La Kanto de la Junularo" estas ekstreme popularaj inter ĉinaj popolamasoj. Serio da brodkastataj koncertoj de Sovetia muziko sub la komuna aŭspicio de la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio kaj la Popola Radio enkondukis rusajn muzikajn majstraĵojn. En Pekino sola 38,600 muzik-amantoj ĉeestis la 97 koncertojn de Sovetia muziko.

La kaŭzon de tiu ĉi granda intereso pri la kultura vivo de Sovetunio klarigis koncize Liu Ŝaŭ-ĉi, prezidanto de la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio. Li diris: "Ni bezonas elĉerpi la novan kulturon de Sovetunio por nin gvidi sur la vojo de konstruo de nova Ĉinio."

I. K.




Sovetiaj spertuloj klarigas la metodon de altrapideca tranĉado al grupo da laboristostudentoj.




## ĈINIA-SOVETIA AMIKECO POR PACO KAJ KONSTRUADO

Ĉina inĝeniero konsultas sian Sovetian kolegon pri la konstruo de lin-fabriko en la Nordoriento.




La frukto de amika kunlaboro en industrio—la ĉefa konstruaĵo de la lin-fabriko leviĝas interne de sia konstrutrabaro.





Sovetia helpo jam alportis la plej progresintajn sciencmetodojn al ĉina agrikulturo. Jen Sovetiaj rikoltmaŝinoj laboras sur la Ŝtata Fermo de Tunghua en la Nordoriento.





La Ĉina Junula Ĥoro prezentis modernajn ĉinajn kantojn al Moskva aŭskultantaro dum vojaĝo en 1951.



La ĉefsidejo de la Ĉinia-Sovetia Amikeca

En la Internacia Librejo en Pekino vendiĝas eldonaĵoj, fonografaĵoj, artaj reprodu






La unua datreveno de la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio estis celebrata en Pekino per prezento de la baletoj *Pacaj Kolomboj*.



Ĉiuj ĉinaj vizitantoj al Moskvo ne preterlasas la oportunon pli bone konatiĝi kun Sovetia kultura heredaĵo. Kuo Mo-jo (maldekstre) kaj aliaj membroj de ĉina delegacio paŭzas por interparolo en la Repin-ĉambro de la Tretjakov-a Ŝtata Art-galerio.

## ĈINIA-SOVETIAJ KULTURAJ RILATOJ


Laborheroino Li Feng-lan kaj film-aktorino Paj Jang (meze), membroj de ĉina delegacio renkontas N. Jakovenko, teksistino de la lanajo-fabriko de Moŝino.



Asocio en Pekino

plej novaj Sovetiaj teatraĵoj kaj plakatoj.





Tornistino Ĉi Kuej-ĉi (dekstre), labormodelo de la Portartur-Dajrena regiono, delegito al la Popola Repraesentanta Konferenco de Nord-orienta Ĉinio.



Du el la heroaj batalantinoj inter la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en Koreio

# Ĉinaj Virinoj en Konstruado kaj Pacdefendo



Ling, fama novelistino kaj pacbatalanto, vicanto de la Tut-ĉinia Asocio de Literaturaj antoj, kun grupo da junaj pioniroj.

Grupo da studentinoj de la Ŝuangĉiaŭ-Traktorlernejo, proksima al Pekino, sin preparas por mekaniigi ĉinan agrikulturon.





# ŜIN FENG-ŜIA

## Historio de aktorino

Du siblantaj petrollampoj de maldelikata formo pendis antaŭ la scenejo. Supre, la fulgo kovris la skvamiĝantan lakon kaj araneajojn de la malnova teatro.

Supre en la galerio, komizoj, malgrandaj komercistoj, kolportistoj, studentoj kaj kelkaj laboristoj interpremiĝis atendante sur la mallarĝaj benkoj kaj plenite de la sorĉo de la teatro.

En la unuaj vicoj la rigardantoj estis kompradoroj de la fremdlandaj ŝipkompanioj, bankoj kaj teksejoj, lokaj krimaj bandanoj de Tientsin, japana-Kuomintangaj pupoj kaj altranguloj, sterniĝante en siaj seĝoj, senĉese trinkante teon, kraketigante melonsemojn, manĝante dolĉajn kompotojn, pikante siajn dentojn, babilante pri la lasttempaj skandaloj...prezoj en la merkato...la milito en la printempo de 1941.

Tamtamo anoncis la komencon de la prezentado. Sed la rigardantoj en la unuaj vicoj estis malpaciencaj. Kiam Ŝin Feng-ŝia enpaŝis sur la scenejon, raŭka voĉo ek-kriis: "Venu, vi bela kreitajo!" Iu ĵetis al ŝi daktilon kiu trafis ŝin sur la vizaĝo. Ŝi volis returniĝi kaj forfuĝi, sed alia voĉo urĝe sufloris el la postscenejo: "Antaŭen! neatentu pri tio!" Ŝi ridetis, movis siajn brakojn gracie kaj komandis la atenton de la rigardantoj... El la galerio hurlis huraoj. La unuaj vicoj estis devigitaj silentiĝi...

Dek minutojn poste, ŝi reiris en la tualetĉambron, la streĉa momento dumtempe pasis. Ŝiaj larmoj portis al ŝi rememorojn pri la pasinteco...

\* \* \*

La korto estis tre kvieta. Knabineto sidis sub granatarbo. Ŝiaj fingroj ludis kun kelkaj velkintaj petaloj makulitaj de koto. Ŝi estis atente aŭskultanta la tremantan melodion de *erhu* (ĉina violono) kiun ludis iu malantaŭ la duonmalfermita pordo kondukanta al la interna ĝardeno. Junulino komencis kanti melankolian arion, mallaŭte, kvazaŭ al si mem, sed kiam la sento tuŝis ŝin, la malalta tono levigis en alteco

kaj intenseco. La knabineto tenis la petalojn senmove. Ŝiaj okuloj brilis kun miro kaj ĝojo.

Maljunulo envenis la korton. Ŝi eksaltis kaj kaptis la manojn de sia patro.

"Paĉjo, ĉu mi povos aliĝi al la teatro iun tagon kaj bele kanti kiel Granda Fratino?"

La maljunulo subite serioziĝis: "Unu malhonoro en la familio estas jam sufiĉa. Vi gustumos amaron, mia infano, se vi iros tiun vojon."

Sed post kelkaj jaroj spite sian antaŭtimon, li fine konsentis al ŝia peto. Por malgranda vendisto de malnovaj vestaĵoj la vivo ne estis facila sub la regado de Kuomintang, kaj des pli malfacila sub la regado de la japanaj invadantoj. Granda Fratino forlasis sian scenejan vivon, edziniĝis kaj iris al la sudo, kaj Feng-ŝia devis helpi vivteni la familion.

Depost ŝia 8-jara aĝo, la teatro havis eksterordinaran sorĉon por Ŝin Feng-ŝia. Ŝi estis jam lerninta de sia fratino kantojn el la Pekina opero. Pere de amiko ŝi ricevis kvarmonatan trejnadon en kantado de *pingkju*. Kun tamburo kaj *erhu* ŝi povis kanti la kantojn el *pingkju* kun mieno de konvinko kiu faris ĉi tiujn maljunulinajn rakontojn de geamantoj

kaj iliaj ĉagrenoj soni kvazaŭ ili efektive okazis. Ŝi amis la movon kaj bruon en la postscenejo kaj la kamaradecon de siaj aktor-amikoj. Ŝi estis talenta je organizado.

Ŝi fariĝis "stelo" kun sia propra trupo. Sed kun la famo, ĝuste kiel ŝia patro diris, venis senĉese ĉagrenoj. Ebriaj lokaj krimaj bandanoj kaj pupaj politikistoj ofte entrudiĝis en la postscenejon. Por ili aktorino estas simpla amuzaĵo.

\* \* \*

En 1943 Feng-ŝia estis 16-jara. Tiun jaron venis al la teatro Ŝju Liu-toŭ, krima bandano kaj naciperfidulo, opio-vendisto kaj kunlaboranto de la japanaj



okupantoj. Feng-ŝia ekplaĉis al li kaj li decidis preni ŝin kiel sian konkubinon. Kiamaniere ŝi povis lin eskapi? Nur bonŝanca invito al Cingtaŭ savis ŝin.

Tuj kiam la vagonaro ekiris, la direktoro venis raportoj ke iliaj vestaĵoj kaj tualetoj estas priserĉitaj kaj disĵetitaj en la tuta vagono. Iu vojaĝanta altrangulo en speciala vagono aŭdis ke aktorinoj estas en la vagonaro kaj demandis ĉu li povus esti regalata.

Por savi la trupon, Feng-ŝia promesis kanti. En la fetora atmosfero, kun la klakado de la vagonaraj radoj, ŝi kantis la selektitan de la altrangulo "Vidvino Ma kun Sia Gastejo", tipan voluptan arion el *pingkju*.

La vojaĝo al Cingtaŭ finiĝis. Ŝi revenis al Tienzin, kaj, kiel ŝi timis, la aŭto de Ŝju Liu-toŭ jam atendis ŝin ĉe la stacio! Ŝi estis enpuŝita antaŭ ol ŝi trovis tempon por pensi kion fari. En sia domo, kun senlima kontento kaj kvazaŭ li farus tute pravan aferon, Ŝju prezentis ĉekon de 30 mil juanoj. Ĝi estis la normala prezo por aktorino-konkubino.

Ŝi batalis por sia korpo kaj animo. Ŝi fariĝis fakte malliberulo en la domo de Ŝju. Post provo de sinmortigo, ŝi sukcesis forkuri kaj akuzis Ŝju ĉe la policejo. Sen eĉ unu ŝanco por renkonti lin vid-al-vide, ŝi informiĝis ke li estas trovita senkulpa de ĉiuj akuzoj.

Post multa pledado kaj regaloj al la intervenantoj, fine estis aranĝite ke ĉiuj ŝiaj kofroj kaj la ornamaĵoj kiujn ŝi posedis, ŝiaj orelingoj kaj oraj braceletoj, ŝia felta surtuto kiun Ŝju ŝtelis, devis resti ĉe li kiel "kompensaĵoj por la perdo kiun li suferis."

Pro la konsiloj de amikoj Ŝin Feng-ŝia forlasis la teatron en Tienzin dum la regado de Ŝju kaj liaj japanaj protektantoj en la urbo.

La Venka Tago kontraŭ Japanio en 1945 reportis Kuomintang. Aŭ pli precize diri, ili estis reportitaj de la usonanoj per Usonaj ŝipoj. En Tienzin oni celebris malmulte sciante kio okazos en la estonteco. Feng-ŝia pensis ke tio almenaŭ signifas liberecon por ludi sur scenejo. Ŝi efektive ludis. La unuan nokton en la daŭro de fulmo ŝi ekvidis sub la rebrilo de la sceneja ilumino la vizaĝojn de siaj rigardantoj en la unuaj vicoj. Ili estis la samaj! La nura diferenco estis la ruĝaj maskoj de Usonaj soldatoj kaj ĉe la flankaj elirejoj la brilantaj blankaj kaskoj de municipalaj policianoj "Konservi Ordon". La naciperfiduloj kiuj iam servis la japanojn, la lokaj krimaj bandestroj kaj neniofarantaj riĉuloj estis ankoraŭ tie. Ili rekuniĝis kun siaj malnovaj mastroj kaj estis eĉ laŭdataj ke ili laboris kiel "subteraj laborantoj" por Kuomintang.

Dum momentoj Ŝin Feng-ŝia sentis la malnovan veran ĝojon en la prezentado. Alitempe ŝi sentis trompiĝon kaj doloron. Por kiuj ŝi prezentas? Ĉu por tiuj diboĉuloj kaj friponoj?

La samaj malnovaj malamikoj atakis ŝian arton, kaj aldoniĝis aliaj. Ebriaj Usonaj soldatoj, protektataj de KMT-polico, senbridiĝis tra la tuta urbo. Ili ĵetis malplenajn bierbotelojn sur la scenejon, kaj kreis tumultojn en la teatro, ke la rigardantoj timis eniri. Ŝin

Feng-ŝia la duan fojon forlasis la teatron kiun ŝi tiel amis. Ŝi edziniĝis. Tio estis kvazaŭ elirvojo el la konstanta humiliĝo de aktorina vivo. La edzo estis homo kiu ŝajnis pli afabla ol la aliaj.

Nur kelkajn tagojn poste ŝi trovis ke ŝia edzo estas aktiva membro de la sekreta societo "La Grupo de Tri Feoj" kiu havis tre intiman rilaton kun la Kuomintang-reakciuloj. Li ankaŭ funkciigis hazardludejojn kaj bordelojn. Ŝia sonĝo pri edziniĝo disrompiĝis tiel malagrabla kiel ŝia sonĝo pri teatro.

Post unu jaro, en januaro de 1949, Tienzin estis liberigita de la Popola Armeo. Feng-ŝia ne bone komprenis kion ĝuste signifas la vorto liberigo. Sed ŝi atendis senpacience kun la esperemo de junuleco. La malnovaj Kuomintang-ĉefoj rapidis sin kaŝi aŭ forkuris. Tio jam signifas liberigon per si mem. Sed ili postlasis marĉon de mensogoj: "La artistoj estos devigataj vesti sin en uniformoj! La komunistoj fermos la teatrojn!"

Sed nur kelkajn semajnojn poste, teatro en apuda Tangŝan invitis Ŝin Feng-ŝia al prezento. Kiel surprizita ŝi estis ke la letero estis adresita al ŝi respektive kiel "artlaboranto".

En Tangŝan ŝi kaj aliaj aktoroj de *pingkju*, popolaj muzikistoj kaj artistoj estis invititaj de la Arta kaj Literatura Buroo de la Urba Registaro alesti la unuan Konferencon de Art- kaj Literatur-Laborantoj de Tangŝan. Sidante inter homoj kiujn ŝi neniam antaŭe renkontis, famaj verkistoj kaj artistoj, ŝi sentis nervoza kaj iom timema. Ŝi apenaŭ kuraĝis moviĝi de sia seĝo, sed ŝia koro batis rapide kaj espero levigis alte. Do la Popola Registaro respektis ŝin kiel artiston de *pingkju*? La unuan fojon ŝi sentis la dignon esti respektata pro tio ke ŝi estas aktorino!

En 1949 ŝi venis al Pekino, la nova ĉefurbo de la Popola Respubliko. La teatro Vanŝeng Ŝjuan ĉe Tien Ĉiaŭ (Ĉiela Ponto) ekster la Pordego Ĉienmen faris kun ŝi kontrakton.

Tien Ĉiaŭ estis antaŭe la amuza centro de malriĉuloj. Post pena taga laboro, laboristoj, tricikloveturigistoj, ĉaristoj, kelneroj kaj vendejestroj venis tien por rigardi la prezentadon de la popolaj artistoj, magiistoj, ĵonglistoj, akrobatistoj kaj ŝnurdancistoj. Ili venis por aŭdi la rakontistojn de popolaj rakontoj, kantistojn de popolaj kantoj, kaj komikajn dialogistojn kaj vidi mallongigojn de la grandaj klasikaj teatraĵoj aŭ aĉeti necesajojn de la subĉielaj vendejoj.

Feng-ŝia estis aŭdinta pri la bordeloj kaj malriĉeco de Tien Ĉiaŭ. "Por Kio utilis ludi tie?" ŝi pensis. Sed la unua tago kiun ŝi pasigis en tiuj stratetoj plenaj de butikoj kaj subĉielaj vendejoj kaj la unua ludo kiun ŝi donis en la malgranda teatro montris ke ĉi tie ankaŭ okazis ŝanĝo. La almozuloj kaj bordeloj malaperis. La rigardantoj aŭdis silente kun ravite streĉa atento. Feng-ŝia prezentis sian plej bonan ludaĵon. En tiu jaro Vanŝeng Ŝjuan fariĝis la plej populara teatro en Tien Ĉiaŭ.

(daŭrigo sur p. 54)



# LA OVO-LIBROJ



Ili estas nomataj "ovo-libroj," ĉar ili estas tiel malkaraj kiel ovo, kaj vi povas trovi tiajn librojn en ĉiu kamparana familio. En pasintaj tagoj, ĉe festoj kaj foiroj, librovendistoj faris viglan negocon en ĉi tiuj maldikaj libretoj kun iliaj simpla lingvo kaj familiara formo — kun foto de malnovstila aktoro sur la kovrilo, kaj interne, mirlando — por unuova prezo. Kamparanoj ŝatis ĉi tiujn malnovajn familiarajn rakontojn. Ĉiuj Estas Fratoj; La Kuraĝa Fiŝkaptisto kaj Lia Filino batalantaj kontraŭ siaj subpremantoj; la fraŭlino kies larmoj por sia karulo disfaligis la Grandan Muron — rakontoj de feoj kaj spiritoj, melodramoj, sentimentaj baladoj; popolaj rakontoj tenantaj siajn popularan fortecon kaj integrecon kaj aliaj, aliformigitaj en propagandon por adorado de la dioj kaj regantoj de la pasinteco.

Sed lastan jaron, kiam la kamparanoj serĉis aĉeti la plej laste aperintajn libretojn ili trovis ilin tiel malkarajn kiel antaŭe, tamen kiel diferencaj! Ŝanĝigis la kovrilo — kun vivecaj pentraĵoj de la nova popolo. La rakontoj en ili estas novaj, sed tiel absorbaj kiel la malnovaj. La malnovepokaj herooj — sed kun diferenco, aperantaj nun en siaj veraj roloj kiel la herooj de la popolo. Kaj rakontoj de la hodiaŭaj herooj — laborherooj, volontuloj batalantaj kontraŭ la Usonaj invadistoj en Koreio; modernaj inventistoj; rakontoj pri kaptiĝo de Kuomintangaj spionoj, amrakontoj kaj geedziĝo en la nova, emancipita socio. Rakontoj pri la mirindaĵoj kreitaj de la popolo. Kaj la prezo — la sama — la moderna ovo-libro! Novaĵo disvastiĝis. Centoj da miloj da novaj "ovo-libroj" estas venditaj.

## Domo de Literaturaj Trezoroj

En unu-ĉambra librejo mi renkontis la estron de la plej grava el la kvindekkelkaj eldonejoj de ovo-libroj en Pekino. La interno de la librejo estis kvazaŭ farita el libroj, tegita de planko ĝis plafono per siaj paperproduktoj. Liu Ju-ĉen, la

eldonisto, diris al mi kiel la komerco progresis ĝis tia grado ke pli ol dek milionoj da ekzempleroj de diversspecaj libroj estas venditaj.

La prapraavo de Liu Ju-ĉen estis malriĉa Hopej-a kamparano. Dum vojaĝo al Ŝantung-Provinco, li amikiĝis kun ĉarpentisto, kiu sciis kiel fari lignogravuraĵon kaj presadon. Maljuna Liu rememoris siajn malnovajn popolarakontojn. Ilin surpaperigis dungita skribisto. La ĉarpentisto ilin gravuris, kaj ili ekvendis rakonto-librojn. Skribitaj en la popola lingvo — la parollingvo kun nur iom da literatura stilo de la klasika lingvo — iliaj rakontoj trafis la ŝaton de la kamparanoj. Ili nomis sian malgrandan laborĉambron: Paŭ Ven Tang — la Domo de Literaturaj Trezoroj. Tio okazis jam antaŭ pli ol jarcento. Iliaj libroj disvastiĝis tra la vilaĝoj de Nordĉinio. La estinta novafero nun jam fariĝis institucio.

La filo kaj nepo de Liu daŭrigis lian laboron. Ili antaŭeniris kun la tempo. Ili aĉetis aŭtomatan presmaŝinon, pliiĝis eldonojn, malaltigis kostojn. Tamen, jaron post jaro, la enhavoj de ĉi tiuj libroj restis la samaj. La sana demokrata perspektivo kaj la profunda, vera sentimento eĉ de la plej bonaj el la historioj estis peze kovritaj de feŭda kaj duonkolonia ideologio. Spite la deziron de siaj eldonistoj servi al la kamparanoj, ĉi tiuj libroj agis kiel narkotiko al la menso de siaj legantoj.

Hodiaŭ, Paŭ Ven Tang estas transformita. La ĉefjurnalaj nun nomas ĝin "popola librejo." Antaŭ du jaroj, baldaŭ post la liberigo, tri homoj en kadra unuforma aĉetis librojn ĉe la librejo kaj interparolis kun eldonisto Liu. Li estis surprizita ke ili sciis tiom multe ne nur pri liaj libroj sed ankaŭ pri liaj legantoj. Ili estis la romanisto Ĉaŭ Ŝu-li kaj la novelistoj Miaŭ Pej-ŝih kaj Vang Ja-ping. Ili invitis lin aliĝi al la Pekina Esplora Societo por Popolara Krea Verko. Tie, li kaj aliaj eldonistoj havis multajn diskutojn kun verkistoj interesataj pri la samaj

problemoj. Nur tiam li konstatis kiom da malutilo liaj libroj nekonstatis faris.

Kiam Paŭ Ven Tang entreprenis reformi siajn librojn, tiaj famaj verkistoj kiaj Laŭ Ŝe kaj Ĉaŭ Ŝu-li tuj kontribuis dudek rakontojn. Liu estis ankoraŭ iom skeptika. Ĉu la kamparanoj ŝatus ĉi tiujn novajn rakontojn? Li rapide trovis la respondon. Pli ol 900,000 ekzempleroj estis venditaj en kelkaj monatoj, kaj la kamparanoj postulis pli multe. Ĉiuj aliaj Pekinaj eldonejoj de ovo-libroj sekvis lin.

En la lasta unu kaj duona jaroj, Paŭ Ven Tang sola eldonis pli ol cent novajn rakontojn. Malnovaj rakontoj estis reskribitaj, kaj novaj kreitaj. Progresema verkistoj elektis famajn malnovajn popolarakontojn kaj ilin remuldis, donante al ili novajn signifojn aŭ revivigante iliajn originalajn beloj. Ni ankoraŭ havas la rakonton pri Vu Sung, la fama popola heroo, kiu foje ĝisebrie drinkis kaj renkontis tigron sur monto. Post furioza batalo li mortigis la beston. Kvankam la rakonto estas malnova, tamen la instruo estas nova. La nova rakonto klarigis la averton de Prezidanto Maŭ Ze-tung: imperiismo similas al malsatega tigro kiun ni nepre devas mortigi, alie ĝi mortigos nin. Inter la novaj rakontoj, la Dek Fratinoj Kiu Fanfaronas pri Siaj Edzoj estas unu el la plej popularaj. Dek fratinoj edziniĝis al malsamprofesiaj edzoj. Unue, ĉiu el ili fanfaronas, ke ŝia edzo estas la plej kapabla; sed poste, ili ĉiuj konstatas, ke nur per kunlaboro la talentoj de iliaj edzoj povas vere kontribui al la bono de la popolo kaj ĉiuj povas sin konduki al pli feliĉa vivo.

La postulo de ovo-libroj estas nun pli granda ol iam ajn antaŭe, ambaŭ pro ilia nova enhavo kaj la rapida disvastiĝo de leglernado en la liberigita kamparo. La poŝtofacejo nun akceptas abonkotizojn por ili en iu ajn vilaĝo. La postulo superas la liveron.

Kie estas la malnovaj ovo-libroj? Liu diris al mi: "Ŝanĝitaj en paperpulpon por fari novajn librojn por la popolo!"

G. Ĝolabio



## Ĉinia-Sovetia Traktato Celebrita

La dua datreveno de la subskribo de la Ĉinia-Sovetia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo je la 14a de februaro estis vaste celebrata tra tuta Ĉinio.

Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj J. V. Stalin, prezidanto de la Konsilo de Ministroj de U.S.S.R. interŝanĝis varmajn mesaĝojn de saluto.

Ĉoŭ En-laj, Ĉefministro por Eksterlandaj Aferoj de la Popola Respubliko de Ĉinio kaj Liu Ŝaŭ-ĉi, prezidanto de la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio faris paroladojn dum granda kunveno de reprezentantoj en Pekino por celebri la datrevenon.

Pli ol 650 gastoj inkluzive de gvidantaj membroj de la Popola Registaro ĉeestis grandan bankedon donitan de N. V. Roŝĉin, Sovetia ambasadoro por Ĉinio.

La ĵurnaloj donis grandan spacon al la novaĵo kaj specialaj artikoloj pri la datreveno. Specialaj programoj estis disaŭdigataj de ĉiuj brodkastaj stacioj.

## Ĉinia-Sovetia Amikeco

La Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio gvidata de Liu Ŝaŭ-ĉi, vicprezidanto de la Centra Popola Registaro, estis fondita la 5an de decembro, 1949.

La ĉefa laboro de la Asocio estas konigi al la ĉina popolo pri la sociaj kaj kulturaj atingoj de la Sovetia popolo. Ĝi plenumadas tion per preparado de legmaterialoj, distribuado de filmoj, aranĝo de foto-ekspozicioj, lekcioj, koncertoj kaj diskutadoj. Ĝi ankaŭ organizis ruslingvajn kursojn en lernejoj kaj per la radio.

Je ĝia invito, multaj Sovetiaj instruituloj vizitis Ĉinion kaj lekciiis tra la lando. Tiuj inkluzivas la faman filozofon D-ro P. Judin, biologon N. I. Nuĵdin, arkeologon F. V. Kisselev kaj ekonomiiston B. G. Boldjrev.

Filmoj el Sovetio estis distribuitaj al 140-grupoj. 48 el tiuj grupoj faris 7,000 projekciojn kiujn ĉeestis 16,000,000 personoj. Pli ol 3,000,000 popolanoj vizitis la 10,000 foto-ekspoziciojn. 74 periodaĵoj kaj ĉirkaŭ 500 libroj kaj broŝuroj estis eldonitaj en grandaj eldonnombroj kaj distribuitaj.

La Asocio ankaŭ zorgas pri konatigado al la Sovetia popolo pri la progreso de la nova Ĉinio. Ĝi havas intiman interrilaton kun multaj kulturaj organizoj en Sovetunio. En 1951 la Asocio transsendis 20,000

leterojn de amikeco al la Sovetia popolo de grupoj kaj individuoj en Ĉinio inkluzive de laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj studentoj.

La membraro de la Asocio jam pliiĝis de nur iom pli ol 3,000,000 en oktobro, 1950 ĝis pli ol 23,000,000 je la nuna tempo. Nun sintrovas 1,300 filioj kaj 62,880 sub-filioj en 27 el la 28 ĉinaj provincoj, 1,126 el la 2068 gubernioj kaj en la regionoj loĝataj de minoritataj nacioj. La agado de la Asocio ne limiĝas en la urboj. La kamparana membraro jam leviĝis de la kvara ĝis la unua loko nuntempe.



## Sukcesoj en Ole-industrio

Raportoj faritaj en la lastaj du jaroj de ole-esploraĵ grupoj montris ke Ĉinio havas grandajn riĉfontojn de oleo. Dum novaj ole-rezervoj estas trovataj la disvolvo de rafinaĵ instaloj de oleo rapide pliiĝas la kvanton de enlande produktita petrolo sur la merkato.

Grandaj olemoj jam estas eltrovitaj en la granda okcidenta provinco Sinkiang kaj aliaj okcidentaj kaj nordokcidentaj regionoj.

La granda plifortiĝo de ĉina oleo-industrio montriĝas en la sekvantaj ciferoj: Kompare kun 1949, produkto de kruda oleo pliiĝis je 170%; produkto de petrolo je 49%; produkto de gasoleno je 55%. Oleo rezervata de la Ĉina Nacia Petrolo-Korporacio plimultiĝis 1.5 oblojn, la nombro de konservejoj pliiĝis je 90% kaj la dungitaro pligrandiĝis je 29.38%.

Grandskala boresplorado de 10,000 metroj estis farita en 1951 kaj esploraĵ agadoj estis tri obloj de tiu de 1949. 90% el la nuna olerafina ekipo estis instalita dum la pasintaj 2 jaroj.

Antaŭ liberigo la petrolo industrio de Ĉinio estis efektive strangolita de la Usonaj kaj Britaj monopolistoj.

La kompanioj Standard Vacuum, Texaco kaj Asiatic Petroleum (Shell) havis filiojn en pli ol 1,000 urboj en orienta kaj okcidenta Ĉinio per kiuj ili vendis importitan petrolon valorantan je 3,277,900,000 Usonaj dolaroj inter 1905 kaj 1949. Dum la Kontraŭjapana Milito kiam estis malfacile importi gasolenon en Ĉinion, ole-rafinejo estis fondita en Jumen, Kansu-Provinco. Sed tuj post la venko super Japanio kiam la Usona importado rekomenciĝis, la Ole-rafinejo de Jumen komencis suferi grandan malprofiton kaj ĝi ekzistis nur nome kaj ĉesis produkti. Nun, tamen, faciligo en rafinado estas rapide disvolvata.

## Ŝansi-Provinco Planas Grandan Pliigon de Riĉaĵoj

Tra tuta Ĉinio lokaj registaroj estas farantaj striktajn planojn por 1952 por levi produkton kaj konservi riĉfontojn per praktiko de strikta ekonomio. Celoj de ekstra riĉaĵo kreota en tia maniero super la ordinara produkta normo estas adoptitaj.

La Popola Registaro de Ŝansi-Provinco planis pliiĝi riĉaĵon valorantan je 2,000 miliardoj da juanoj.

En industrio la plano estos plenumita per pliigo de produkto, plibonigo de kvalito, redukto de produktokosto kaj apliko de ekonomiaj kalkul-metodoj. Detalaj proponoj estas jam pretigitaj por la gravaj industrioj en la regiono inkluzive de tiuj de sulfuro, gipso, fero, karbo, ŝpin-teksaĵoj kaj manfaraĵoj. Peza industrio pligrandiĝos sian produkton je kvar ĝis sep procentoj kaj malpeza industrio pligrandiĝos sian produkton je ses ĝis dek procentoj. Specialan zorgon oni donos pri la rapidigo de la turniĝado de kapitalo.

En agrikulturo, la patriota kampano por pligrandaj rikoltoj estos daŭrigita ĉijare. La celo de tiu ĉi provinco estas pliprodukto de 250,000 tunoj da greno kaj 30,000 tunoj da desemigita kotono. Grandaj penoj estos farataj por pligrandigi la produkton de ĉiu hektaro. Oni ankaŭ klopodos pliiĝi la interhelpajn teamojn de 100,000 ĝis 150,000. La loka registaro estas faranta paŝojn por certigi ke akvoradoj, ŝprucigiloj kaj aliaj ekipaĵoj kaj naturaj kaj hemiaj sterkoj utilos al ĉiuj terkulturistoj. Publikaj farmoj estos plifortigitaj, kaj per pli scienca utiligado de la akvoprovizo la nombro de grenagro pligrandiĝos laŭ antaŭkalkulo je 60,000 hektaroj.



## Progreso en Forstigo en Lasta Jaro

Forstigo jam antaŭenpuŝiĝis en diversaj partoj de Ĉinio. En la Sudokcidento, kie estas grandaj lignoriĉfontoj, granda projekto estis sukcese kompletigita lastjare. En lasta printempo arboj estis plantitaj sur 42,600 hektaroj da tero en tiu regiono. Poste en junio, 1,940,000 arboj estis plantitaj en Junnan-Provinco, tiel multe kiom plantis en 20 jaroj antaŭ la liberigo. Aldone, 1,140,000 arboj estis plantitaj en Siĉang-Regiono, Sikang-Provinco.

Speciala atento estis donita al la protektado de arboj. Pli ol 10,000 teamoj estis organizitaj lastjare en Sudokcidenta Ĉinio por protekti la arbojn. En Sikang-Provinco centoj da tiaj teamoj estis formitaj kune de la Han- kaj Ji-nacianoj.

Raportoj el Ŝantung montris ke forstigo en tiu provinco ankaŭ multe progresis lastjare. En lasta vintro pli ol 300,000 terkulturistoj aktive partoprenis en tiu ĉi laboro kaj 16,600 hektaroj da tero estis forstigitaj.

Plano por planti pli multe da arboj ĉi printempe en tiuj ĉi regionoj estas nun bone efektiva.

## Artezaj Putoj por la Seka Tero de Sinkiang

La unua arteza puto elŝpruciganta vivdonan akvon al la soifa tero de Sinkiang estas jam sukcese kompletigita en Hami, la produktejo de la fama Hami-akvomelono.

Ĝi estas la unua el nombrego da artezaj putoj fosotaj en ĉiuj partoj de la malalttero de tiu provinco.

En Sinkiang, la plej nordokcidenta provinco, pluvo estas tre malofta. Tio ĉi estas, grandparte, la kaŭzo de la malmulteco de loĝantaro en lokoj kie agrikulturo estas nebla sen irigacia rimedo. Terkulturistoj loĝantaj proksime de montoj ĝenerale dependas de riveretoj kiuj estiĝas kiam komenciĝas neĝo-degelo. Sed la akvo rapide ensorbiĝas en la teron kaj grandaj terpecoj sekve suferas mankon de akvo. Antaŭe, loĝantoj en la Turfan-Baseno fosis subteran irigacian sistemon por alkonduki akvon de malproksime, kaj la regiono fariĝis fama oazo en la dezerto. Oni diras, ke tiu ĉi metodo estis komencita en la Han-Dinastio (206 a. K. ĝis 220 p. K.), sed ĝi estas tro multekosta por aplikigi ĝenerale kaj nepraktika por la loĝantoj malproksimaj de advofonto.

Por faciligi la disvolvon de agrikulturo en tiu ĉi seka provinco, la Akvokonserva Buroo de la Provinca

Popola Registaro de Sinkiang organizis laborgrupojn por fari eksperimentojn pri borado de artezaj putoj. La teamo sukcesis en sia laboro en Hami.

La unua arteza puto estas 25.6 metrojn profunda kaj 15 centimetrojn diametre larĝa kun akvo spontanee elŝprucanta el la tero.

## Nova Ĥemia Produktaĵo

Kreado de kloridizita kaŭĉuka preparaĵo—ia artefarita lako por protekti ferajn vazojn kontraŭ kaŭterizo de acidoj kaj alkaloj kaj por aliaj industriaj uzoj — jam estas sukcese plenumita de Ĉaŭ Teh-jen, asistanto en la Ĥemia Departemento de Tungki-Universitato en Ŝanhajo.

La Ĥemia Departemento de la Universitato ricevis la taskon de la Industria Departemento de Orienta Ĉinio en lasta oktobro. Komprenante la gravecon de la Ĥemia produktaĵo por la disvolvo de la ĉina industrio, Ĉaŭ, post konsultado de Ĥemia literaturo pri tiu subjekto, komencis mem faradi eksperimentojn. Metallo lakita per la preparaĵo elfarita de Ĉaŭ Teh-jen, neniom difektiĝis enmetite en fortan solvaĵon de ambaŭ muriata kaj sulfura acido kaj 40-procenta solvaĵo de kaŭstika sodo por 500 horoj. Ankaŭ pruviĝis ke ĝi povas tre firme algluiĝi al fero.

Sekvante sian unuan sukceson, Ĉaŭ direktis sian atenton al perfektigo de la preparaĵo, kaj en mallonga tempo sukcesis kontentigi ĉiujn postulojn de la Industria Departemento de Orienta Ĉinio.

La preparaĵo efikas ne nur en protekto de feraj vazoj entenantaj acidojn sed ankaŭ povas esti uzata por imunigi brulemaĵojn kontraŭ fajro. Ĉiuspecaj maŝinoj, kiel surteraj aŭ maraj kaldronegoj povas esti lakitaj per la preparaĵo sur la interna surfaco por esti protektata kontraŭ kaŭterizo.

## La Rezin-industrio de Kuangtung Floras

La rezinproduktado en Kuangtung-Provinco jam leviĝis en la pasintaj du jaroj de la 12a ĝis la dua grado laŭ internacia normo de kvalito. En lasta jaro la produkto pli ol duobliĝis kompare kun la plej alta antaŭmilita nivelo de 1936.

Kuangtung-Provinco estas riĉa je pinarbaroj, tamen antaŭ liberigo la rezinindustrio estis tiel malakcelita, ke Ĉinio importis 3,000 tunojn da Usona rafinita rezino ĉiujare kaj eksportis sian krudan produktaĵon por prepariĝi eksterlande. Sed

hodiaŭ la distilejoj estas ne nur produktantaj al la vasta enlanda merkato sed samtempe eksportanta al Sovetunio kaj la popolaj demokratioj.

En la jaro 1949 funkciis nur 53 distilejoj kaj du trionoj de la 6,000 tunoj de ilia produktaĵo restis neaĉetitaj. Tamen sub la gvido de la ŝtata ekonomio, rapidaj ŝanĝoj montriĝis. La ŝtataj kompanioj de lokaj produktaĵoj injektis novan vivon en la industrion per enkonduko de kvalita normigo kaj stabiligo de prezoj kaj kuraĝigo al la terkulturistoj plibonigi siajn metodojn de rezinlĉerpo.

Certiĝinte pri certa merkato, la distilistoj ekstrebis por konkuri la teknikajn malfacilojn. Ili reduktis malpurajojn de 1.8% ĝis 0.08% kaj levis la fandiĝan punkton je 10 gradoj centgradaj. En 1950 ili levis la kvaliton de la rezino de la 12a ĝis la tria grado laŭ internaciaj normoj. En 1951 ili levis la kvaliton plue ĝis la dua grado laŭ internaciaj normoj kaj en kelkaj distilejoj ili sukcesis en produkto de unuagrada rezino. Je la fino de la pasinta jaro jam troviĝis 173 distilejoj kaj la proporcio de malaltgrada rezino jam falis ĝis 8 procentoj de la tuta produkto.

## Vilaĝaj Dramgrupoj Montras Talenton

Amatoraj teatraj grupoj estas stariĝantaj tra la ĉina vasta kamparo tuj post la agrara reformo.

En Hupej-Provinco sin trovas pli ol 2,300 grupoj kun 600,000 membroj; 5,000 grupoj en Ĉekiang-Provinco kaj 10,000 en Honan-Provinco. En kelkaj regionoj, eĉ ĉiu vilaĝo havas sian propran dramludan grupon.

Tiuj ĉi grupoj ludas ĉefe lokajn teatraĵojn kaj mallongajn dramojn popularajn al la kamparanoj; multaj el tiuj ĉi dramoj baziĝas sur vivaj personoj kaj lokaj aferoj. Popularaj temoj estas la novstila geedziĝo, konkero de analfabeteco, interhelaj teamoj kaj plibonigo de terkulturaĵoj metodoj. Kaj la teatraĵoj havas grandan valoron de eduko. En iu vilaĝo de Ĉekiang-Provinco, multaj viroj kaj virinoj eklernis en la vintra lernejo vidinte dramon pri la utilo de eduko.

Viroj kaj virinoj en la kamparo, instruistoj de lokaj lernejoj kaj popolartistoj estas disvolvanta grandan inklinon al dramludo kaj verkado de teatraĵoj. Kelkaj el la vilaĝaj teatraĵoj estas luditaj en la urboj kaj literaturaĵoj kritikoj esprimis grandan ŝaton al la granda fonto de kreiva talento kiu, la unuan fojon, havas ŝancon sin montri.

# Edziĝo de Erhejĉjo

(daŭrigo)

## Ĉaŭ Ŝu-li

### 8. Arestu en Paro

Ĉinjo detale rakontis al Erhejĉjo, kiel ŝia patrino ŝin fianĉinigis, ŝajnis sin feino kaj kion kantis. "Ni ne nin ĝenu pro ŝi!" diris Erhejĉjo. "Mi jam demandis al kamaradoj en la distrikta administrejo. Ili diris, ke iu ajn geedziĝonta paro povas registriĝi tie se nur ili interkonsentas. Neniu alia povas malhelpi..." Tiam aŭdiĝis paŝbruo ekstere. Erhejĉjo elŝovis la kapon por rigardi kaj vidis en la krepusko kvar aŭ kvin homojn. Unu el ili diris, "Arestu en paro, arestu en paro!" Ili ambaŭ rekonis ke tio estas la voĉo de Kin-vang, kaj koleriĝis Erhejĉjo kaj laŭte kriis, "Arestu? Ni ja faris nenion kontraŭ leĝo!" Venis ankaŭ Ŝing-vang, kiu ordonis, "Kaptu, kaptu!" Mi vidos ĉu vi agas kontraŭleĝe aŭ ne. Pro vi mi jam kelkajn tagojn estis zorgoplena!" "Ni iru kien vi volas," diris Erhejĉjo. "Ĉe ĉe la Limregiona Registaro vi ne povos min kulpigi! Ni iru!" "Iru?" diris Ŝing-vang. "Ne estas tiel facile! Lin ŝnurligu!" Erhejĉjo baraktis kelkan tempon, sed nombre superigite finfine li estis ŝnurligita suferinte multajn batojn. "Ankoraŭ virino interne," diris Ŝing-vang. "Ankaŭ ŝin ŝnurligu! 'Kaptu adultantojn en parkaŝo,' tion ja diris ŝi mem!" Tiel ankaŭ Ĉinjo estis ŝnurligita.

La vilaĝanoj en la suda vilaĝo ankoraŭ ne dormis. Aŭdinte la tumulton ili elkuris por rigardi kaj vidis sub kanabtigaj torĉoj du homojn ŝnurligitaj. Kaj sen demando ili preskaŭ ĉion divenis. Elvenis ankaŭ Ĉuko II. Vidinte Erhejĉjon ŝnurligita, li petegis al Ŝing-vang surgenu, "Ŝing-vang! Estas ja nenia mal-



Vidinte Erhejĉjon ŝnurligita, Ĉuko II petegis al Ŝing-vang surgenu.

amikeco inter niaj du familioj! Pro mi, maljunulo, bonvole lin indulgu..." "Mi povas fari nenion," diris Ŝing-vang. "Unue ni sendu ilin al la superuloj!" "Paĉjo! Vi ne zorgu!" diris Erhejĉjo. "Kien ajn ili min sendos, mi restos senkulpa! Mi ne timas ilin!" "Brave, knabo!" diris Ŝing-vang, "sed se vi preferas obstini, do obstinu ĝis la fino!" Kaj li denove devigis la tri milicanojn, "Ilin forkonduku!" "Al la Vilaĝa Administrejo?" demandis unu el la milicanoj. "Kial ankoraŭ al la Vilaĝa Administrejo?" diris Ŝing-vang. "Ĉu ne estis la vilaĝestro kiu lin liberigis lastfoje? Sendu ilin al la Distrikta Milica Komitato por esti militjuĝataj!" Kaj tiel ili forkondukis la junan paron.

### 9. La Profeta Aŭgurado de Ĉuko II

Vidinte ke estas la kuzoj Ŝing-vang kaj Kin-vang kiuj ŝnurligas la junan paron, neniu el la najbaroj kuraĝis peti indulgon por Erhejĉjo. Kaj nur post ilia foriro la najbaroj persvadis Ĉuko II hejmen reiri.

Ripete skuante la kapon Ĉuko II diris, "Ej! Mi ja sciis ke io katastrofa baldaŭ okazos. Matene antaŭhieraŭ kiam mi ĵus suriris la monton survoje al la kampo, mi renkontis junan virinon en funebra kostumo, rajdantan sur azeno kaj jam tiam sciis ke tio estas malbona aŭguro. Laŭ horoskopoj, ĉijare mian sorton destinas la stelo *lohoŭ* kaj mi devas eviti funebrantojn. Tial mi kuraĝas iri nenien. Kiu sciis ke la malfeliĉan renkonton mi ne povis eviti! Hieraŭ nokte mia edzino songis ke en la templo oni ludas teatraĵon. Hodiaŭ matene korvo grakis dekelkajn fojojn sur la tegmento de mia domo.... Ve! tia estas la sorto kaj tute ne evitebla." Tiel li grumbladis. Enuiĝinte la najbaroj diris kelkajn konsolajn vortojn kaj disiĝis.

Kiel homoj kun peza zorgo en koro povas endormiĝi? Krom la adoptita bofilino, tiun nokton neniu en la familio de Ĉuko II endormiĝis post la foriro de la najbaroj. Palpinte sian vizagon Ĉuko II elprenis tri monerojn kaj petis aŭguron. Vidinte la aŭguran signon li terure paliĝis pro timo. "Katastrofe, katastrofe!" li diris. "El tero estiĝas fajro, kaj fajro potencas en somero. Mi timas ke minacas danĝero. Ve! kiam oni elektis Erhejĉjon taĉmentestro de la Junulaj Kontraŭ-japanaj Pioniroj, mi ja diris ke li ne akceptu la postenon, sed la idiota bastardo persistis esti eminentulo! Ili diris ke li estos militjuĝata. Se li ne estus taĉmentestro, kiel li povus kulpi kontraŭ milita leĝo?" Ankaŭ la edzino manklakante kaj piedbatante diris, "Ho, mia patreto! kiu sciis ke vi venigas tian katastrofon?" Tahej ilin



konsolis, "Ne timu! Kio jam okazis, tion ni lasu! Mi pensas ke mia frato ja ne mortigis kaj tial ne povas ricevi gravan punon! Ĉar ili jam sendis lin al la Distrikta Administrejo, mi do iru tien por informiĝi kiel la afero statas! Vi ambaŭ enlitiĝu nun!" Tion dirinte li foriris kun lanterno en mano.

Post la foriro de Tahej, Ĉuko II ankoraŭ detale studis kun klinita kapo la aŭguran signon kiun li ĵus ricevis. Post momento aŭdiĝis el malproksimo virina ploro, kiu pli kaj pli proksimiĝis kaj baldaŭ ĝis la fenestro. Ekmalfermiĝis la pordo kaj envenis la virino. Antaŭ ol Ĉuko II povis distingi kiu ŝi estas, la virino lin kaptis kaj kun ploro kaj kun insulto diris, "Liu Ŝiu-teh! Redonu al mi mian filinon! Kien mian filinon forlogis via filo? Redonu al mi..." La edzino de Ĉuko II ĵus furiozis pro kolerego. Vidinte ke la veninto estas Feino III ŝi trovis viktimon por elverŝi sian koleron. Ŝi desaltis de la terlito kaj la alian kaptinte diris, "Estas bone ke vi venis! Mi ne plu bezonas iri vin serĉi! Vi patrino kaj filino delogis mian filon al malvirto kaj nun vi ankoraŭ havas la kuraĝon senhonte min kulpiĝi! Ni du ankaŭ iru al la Distrikta Administrejo por juĝo!" La du virinoj ruliĝis sur la planko kroĉiĝinte unu al la alia. Ĉuko II vane klopodis ilin disigi. Nun li tute forgesis pri sia aŭgura signo. Feino III fariĝis iom timema, vidinte ke la edzino de Ĉuko II jam furioziĝis kiel freneza hundo! Ŝi ne kuraĝis daŭrigi la batalon kaj post iom da lukto sin liberigis el la manoj de la edzino de Ĉuko II kaj foriris. La lasta ŝin postkuris el la pordo sed estis retenita de Ĉuko II ankoraŭ insultante kaj blasfemante.

## 10. Indulgu! Indulgu!

Ĉuko II maldormis la tutan nokton kaj senĉese ripetis, "Kial Tahej ankoraŭ ne revenis? Kial Tahej ankoraŭ ne revenis?" La duan tagon antaŭ mateniĝo li ekiris al la Distrikta Administrejo. Duonvoje li vidis ke malproksime revenas Tahej kaj la tri milicanoj, kaj venis ankaŭ asistanto kaj komunikanto de la Distrikta Administrejo. Li vokis de malproksime, "Tahej! kiel iras la afero? Ĉu gravas aŭ ne?" Tahej diris, "Nenio grava! Ne timu!" Tion dirante li alproksimiĝis. Dume foriris al la vilaĝo la asistanto kaj tri milicanoj. Tahej diris al la komunikanto, "Ĉi tiu estas mia patro!" kaj al Ĉuko II, "La Distrikta Administrejo ordonis venigi vin kaj la edzinon de Ju Fu. Iru, paĉjo! Estas nenio grava! Erhejĉjo kaj Ĉinjo tuj liberiĝis alveninte al la Distrikta Administrejo. La distriktaj aŭtoritatoj antaŭ longe sciis ke Ŝing-vang kaj Kin-vang estas famaĉaj kanajloj, kaj jam ilin malliberigis. La asistanto estas sendita al nia vilaĝo por kunvoki amaskunvenon kaj kolekti atestaĵojn de iliaj kontraŭleĝaj agoj. Kiam mi atingis la administrejon lastan nokton, ili jam finis la pridemandon. Mi aŭdis ke nia Erhejĉjo estas permesata edziĝi al Ĉinjo." "Mi ĝojas ke ili ne punos lin," diris Ĉuko II, "sed edziĝi al Ĉinjo li ne devas, ĉar iliaj horoskopoj malkonkordas! Ĉu vi ne aŭdis por kio ili ordonis min venigi?" "Mi ne scias, sed kredeble nenio grava. Vi iru, paĉjo! Mi unue reiros informi



"Tio ja estas fianĉiĝo por li," refutis la distriktestro.  
"Ĉu vi kaj ne li havas la rajton decidi?..."

panjon." La komunikanto diris, "Maljunulo! Nun vi jam scias la ordonon vin venigi. Vi iru unue! Mi iros venigi la alian." Tion dirante li foriris kun Tahej.

Kiam Ĉuko II venis al la Distrikta Administrejo, li vidis Erhejĉjon sidanta kun Ĉinjo sur unu benko. Fingromontrante al Erhejĉjo li riproĉis, "Vi malfeliĉo-kaŭzanto! Liberigita kial vi ankoraŭ ne reiras? Vi preskaŭ min mort-timigis, vi senhontulo!" "Kion vi faras?" diris la distriktestro. "Ĉu la administrejo estas loko por riproĉi kaj blasfemi?" Silentiĝis Ĉuko II. "Ĉu vi estas Liu Ŝiu-teh?" demandis la distriktestro. "Jes!" respondis Ĉuko II. "Ĉu vi adoptis por Liu Erhej infanĉinon?" "Jes!" "Kiun aĝon ŝi havas?" "Ŝia horoskopa simbolo estas simio, ŝi estas ĉijare 12jara." "Knabino ne atinginte 15 jarojn ne estas permesata fianĉiniĝi," diris la distriktestro. "Resendu la knabinon al ŝia hejmo; Liu Erhej jam fianĉiĝis al Ĉinjo." "Ŝi havas nur patron kaj mi ne scias kien li fuĝis," diris Ĉuko II. "Nenien mi povas ŝin resendi. Ke knabino ne atinginte 15 jarojn ne estas permesata fianĉiniĝi estas nur regulo registara. Fakte en la vilaĝoj multaj fianĉiniĝas je la aĝo 7- aŭ 8-jara. Indulgu, mi petas vian moŝton, indulgu!..." "Ĉiuj gefianĉiĝoj kontraŭleĝaj devas esti nuligitaj," diris la distriktestro, "se nur unu el la du flankoj ne konsentas!" "Ni du familioj ja interkonsentis pri la gefianĉiĝo," diris Ĉuko II. "Ĉu vi konsentas, Liu Erhej?" demandis la distriktestro al Erhejĉjo. "Ne!" diris Erhejĉjo. "Ĉu vi havas la rajton tion decidi?" eksplodis Ĉuko II ĵetante al Erhejĉjo koleran rigardon. "Tio ja estas fianĉiĝo por li," refutis la distriktestro. "Ĉu vi kaj ne li havas la rajton decidi? Maljunulo! Nun geedziĝon oni devas mem decidi, kaj vi ne povas tion decidi anstataŭe! Se la knabino, kiun vi adoptis, vere ne havas sian hejmon, prenu ŝin via adoptfilino." "Tion mi povas konsenti," diris Ĉuko II, "tamen indulgu, mi petas vian moŝton, indulgu, ne fianĉigi lin al la filino de Ju Fu!" "Pri tio vi ne havas la rajton interveni!" diris la distriktestro. "Via mosto nepre nin indulgu," petis Ĉuko II maltrankviliĝinte. "Iliaj horoskopoj estas malkonkordaj kaj tio estas afero koncernanta ilian tutan vivon!" kaj li turnis sin al Erhejĉjo, "Erhej! ne estu malsaĝa! Tio estas afero koncernanta vian tutan



**La distriktestro demandis: "Ju Ĉinjo, ĉu vi volas edziniĝi al la viro kiun via patrino elektis por vi?"**

vivon!" "Maljunulo! vi mem ne estu malsaĝa;" diris la distriktestro, "se vi devigos vian 19jaran filon edziĝi al la 12jara knabino, tio kaŭzos al vi tutvivan malfrankvilon! Mi ĉi tion diras al vi nur por vin konsili. Fakte, se nur ili du interkonsentas, estas egale ĉu vi konsentas aŭ ne. Hejmen iru! Se la adoptitan bofilinon vi ne povas resendi, ŝin adoptu kiel vian filinon!" Ĉuko II ankoraŭ volis peti indulgon, sed komunikanto lin elpuŝis.

## 11. Rigardu la Feinon!

Feino III iris al Ĉuko II, unue por montri sian kapablon en kvereloj kaj due por ŝajnigi sin multe zorganta pri sia filino. Fakte ŝi tre ĝojis ke Ĉinjo estis iel punata. Tial post la kverelo kun la edzino de Ĉuko II ŝi hejmen iris kaj enlitiĝis. La sekvantan matenon ŝi ellitiĝis tre malfrue. Kvankam Ju Fu multe pli zorgis pri Ĉinjo, tamen li mem povis nenion decidi nek kuraĝis ŝin vekti, tial li povis nur mem prepari la matenmanĝon. Kiam la manĝo estis preskaŭ kuirita, Feino III malrapide ellitiĝis kaj komencis tualeti. "Ĉu vi ne iros informiĝi pri Ĉinjo?" demandis al ŝi Ju Fu. "Kial mi iros pri ŝi informiĝi?" ŝi diris. "Ŝi ja estas tiel kapabla por sin zorgi!" Ju Fu kuraĝis nenion plu diri. Finkuirinte li metis la pretan manĝon apud la forno, atendis ĝis ŝi fintualetis kaj nur tiam ili komencis matenmanĝi.

Kiam ili ankoraŭ ne finis la manĝon, venis la komunikanto de la Distrikta Administrejo por sciigi al ŝi la ordonon ŝin venigi. Ŝi ŝajnis tre ĝoja kaj kun trenata voĉo ŝi diris, "Filino plenaĝa min jam ne obeas, mi iros peti la distriktestron ŝin disciplini por mi." Ŝi surmetis novajn vestojn, novan kaptukon, broditajn ŝuojn kaj borderitan pantalonon, pluan fojon sin pudris kaj aldonis kelkajn harornamaĵojn. Ŝi ordonis sian edzon pretigi por ŝi la azenon, sidiĝis sur ĝian dorson kaj ekiris al la Distrikta Administrejo dum Ju Fu sekvis malantaŭe kun vipo en mano.

Kiam ili atingis la administrejon, la komunikanto ŝin kondukis en la ĉambron de la distriktestro. Ŝi tuj

surgenuiĝis, riverencis kap-al-tere kaj ripete kriis, "Via distriktestra moŝto, mi ja dependas de via favora decido!" La distriktestro estis skribanta ĉe la tablo. Vidinte ŝin genuanta sur la tero kun klinita kapo plena de arĝentaj harornamaĵoj, li prenis ŝin por la juna virino malpaciginta kun sia bopatrino antaŭ kelkaj tagoj. Tial li diris al ŝi, "Ĉu ne estas garantianto por via bopatrino? Kial vi ne iras al li?" Konfuziĝinte Feino III levis la kapon kaj rigardis la vizaĝon de la distriktestro. Vidinte ke estas maljuna virino kun pudrita vizaĝo, li trovis ke li eraris. "Vi eraris!" diris la komunikanto. "Tio estas la patrino de Ju Ĉinjo!" "Vi la patrino de Ĉinjo!" diris la distriktestro denove ŝin explore rigardis. "Stariĝu! Ne ŝajnigu vin feino aŭ spirito! Ĉion mi scias pri vi! Stariĝu!" Ŝi stariĝis. "Kiom da jaroj vi havas?" demandis la distriktestro. "Kvardek kvin," ŝi respondis. "Vidu vi mem ĉu vi aspektas homo tiel tualetite?" diris la distriktestro.

Eksplodis en rido knabino de kamparano ĉirkaŭ 10-jara staranta apud la pordo. "Iru ludi ekstere!" diris la komunikanto. La knabino forkuris. "Vi povas mediumi, ĉu ne?" demandis la distriktestro. Feino III ne kuraĝis respondi. "Vi trovis por via filino fianĉon, ĉu ne?" demandis la distriktestro. "Jes," respondis Feino III. "Kiom da mono vi ricevis por tio?" "Trimil kvincent dolarojn." "Kion alian?" "Iom da harornamaĵoj kaj ŝtofo." "Ĉu vi konsiliĝis kun via filino?" "Ne." "Ĉu via filino konsentas aŭ ne?" "Mi ne scias." "Mi ŝin alvoku kaj vi mem ŝin demandu!" diris la distriktestro kaj ordonis la komunikanton venigi Ĉinjon.

La knabino, kiu ĵus elkuris, tuj disvastigis la novaĵon ke en la administrejo estas procesanta maljunulino 45jara sed kun pudrita vizaĝo kaj broditaj ŝuoj. Ĉiuj najbaraj virinoj alkuris rigardi, duone plenigante la korton. Ili flustris unu al la alia, "Vidu! jam 45jara!" "Rigardu la pantalonan randon!" "Kaj la ŝuojn!" Feino III neniam ruĝiĝis dum sia vivo, sed nun la unuan fojon embarasiĝis pro honto. Varmaj ŝvitgutoj striiĝis sur la tuta vizaĝo. Tiam venis la komunikanto kun Ĉinjo kaj intence diris, "Kion vi rigardas? Ĉu ŝi ne ankaŭ estas homo same kiel vi? Ĉu vi neniam tian vidis? Flanken staru!" La virinoj eksplodis en ridego. Ĉinjo estis venigita. La distriktestro diris, "Demandu al via filino ĉu ŝi konsentas!" Feino III aŭdis nur voĉojn en la korto dirantaj, "45jara," "broditaj ŝuoj" kaj tiel plu kaj pro honto forviŝis de tempo al tempo sian ŝviton, sed ne povis plu malfermi sian buŝon por ion diri. Subite la homoj en la korto ŝanĝis sian paroltemon. Ili diris, "Tiu estas ŝia filino," "La filino ne scias tiel bone sin beligi kiel la patrino." Kaj aliaj diris, "Laŭdire ŝi ankaŭ povas mediumi." Des pli malfeliĉe, iu sciante pri ŝia historio intermite rakontis la anekdoton pri "Kaĉiĝas la miligraĵoj." Tiam Feino III elkore preferis sin mortigi per kapfrapo.

"Se vi ne demandas ŝin, mi demandu por vi!" diris la distriktestro. "Ju Ĉinjo, ĉu vi volas edziniĝi al la viro kiun via patrino elektis por vi?" "Ne," respondis Ĉinjo. "Kiu scias kiu li estas?" "Ĉu vi aŭdis?" demandis la distriktestro al Feino III kaj klarigis al ŝi la leĝon pri memdecida geedziĝo, dirante ke la gefianĉiĝo



inter Ĉinjo kaj Erhejĵo estas tute laŭleĝa. Plue li ordonis ŝin redoni al s-ro Vu lian monon kaj donacon. Pro honto ŝi ĉion konsentis.

## 12. Kiel Finiĝis

Kiam la tri milicanoj revenis al Liukia-valo kaj anoncis la areston de Ŝing-vang kaj Kin-vang kaj la alsendon de asistanto por esploro de iliaj krimoj, ĉiuj ĝojkriis. Post la tagmanĝo, estis kunvokita en la templo amaskunveno. Klariginte ĝian celon la vilaĝestro alvokis la vilaĝanojn eldiri la konkretajn krimojn de la du kuzoj. Komence la vilaĝanoj timis ke se la du kuzoj ne povos esti forigitaj, ili revenos por venĝi. Tial longtempe neniu parolis kaj kelkaj timemuloj eĉ flustre konsilis la aliajn dirante, "Tolero signifas sekuron." Tamen junulo ruinigita de la du kuzoj diris, "Ĉu mi ne toleris en la pasinteco? Sed ju pli mi toleris, des pli min minacis malsekuro! Se vi ne eldiros, mi eldiros!" Li komencis de la rakonto kiel Kin-vang alkondukis banditojn al lia hejmo por homrabado, kaj daŭre menciis kvar aŭ kvin el la krimaj agoj de la du kuzoj. Fine li diris, "Mi iom ripozu, ke aliaj ion diru!" Kiam li faris la komencon, multaj aliaj viktimoj sekvis lian ekzemplon interrompante unu la alian. Iuj estis devigitaj doni al ili monon, aliaj estis de ili devigitaj sin pendigi, ies posedaĵoj estis de ili elproprigitaj kaj alies edzinoj estis de ili perfortitaj. Ili ankaŭ ordonis milicanojn kolekti por ili brullignojn kaj kamparanojn sarki por ili herbaĉojn. Ili kolektis grenimposton super la difinita kvanto, eltordis kontraŭleĝe monkontribuon kaj devigis milicanojn ŝnurligi senkulpulojn... Unu akuzo sekvis alian, de tagmezo ĝis sunsubiro, entute kvin- aŭ ses-dek krimaj agoj de la du kuzoj estis menciitaj.

Bazante sur ĉi tiuj krimoj de ili la Distrikta Administristrejo sendis ilin al la Gubernia Registaro. Kiam konfirmiĝis iliaj krimoj, la registaro kondamnis ilin je 15 jaroj da enkarcerigo krom ordoni ilin repagi la perdojn de iliaj viktimoj.

Post la amaskunveno la vilaĝanoj jam kuraĝis partopreni en publikaj aferoj. Baldaŭ okazis reelektado de vilaĝaj kadroj kaj neniu kuraĝis plu senpense elekti malbonulojn. Kompreneble, la edzino de Kin-vang ankaŭ ne estis reelektita. Tamen ŝi diris, "Poste mi provos esti progresema."

Ankaŭ ŝanĝiĝis la du profetoj:

Feino III vere embarasiĝis, kiam ŝi estis cirkaŭata kaj rigardata de la virinoj tiun tagon en la administristrejo. Reveninte ŝi esploris sian aspekton en spegulo kaj trovis ke ŝi vere faris sin ridinda. Ŝi ankaŭ pensis, ke kiam ŝia filino baldaŭ edziniĝos, jam estas tempo por ŝi ĉesigi sian provon esti alloga. Tiam ŝi faris decidon ŝanĝi sian tualeton de kapo ĝis piedoj por esti konvena al sia aĝo. Ŝi ankaŭ kviete forigis la incensotablon,

ĉe kiu ŝi ŝajnigis sin feino kaj spirito dum tridek jaroj.

Reveninte de la Distrikta Administristrejo tiun tagon, Ĉuko II denove preparolis pri la malkonkordo de la horoskopoj de Erhejĵo kaj Ĉinjo. "Lasu vian aĉan aŭguradon! Ĉu vi ne diris ke katastrofo atakos Erhejĵon ĉifoje? Vi aŭguris eĉ kiam vi furzis, sed kion tio helpas? Mi opinias ke Ĉinjo estas bona knabino kaj nia Erhejĵo vivos feliĉe kune kun ŝi! Viaj konkordaj aŭ malkonkordaj horoskopoj estas tute sensencaĵo! Ĉu vi ne memoras vian 'ne konvene por semi'?" Vidinte ke eĉ lia edzino ne kredas je lia magia arto, li hontis denove praktiki ĝin antaŭ la aliaj.

Ĉinjo kaj Erhejĵo revenis al siaj respektivaj hejmoj kaj trovis siajn gepatrojn iom ŝanĝitaj. Profitante la okazon ili petis la najbarojn persvadi la du profetojn, kiuj facile aprobis ilian geedziĝon. Post iom da preparo okazis la soleno. La juna paro estas tre feliĉa kaj kontenta. La najbaroj diras ke ili estas la unua paro de bonaj geedzoj.

Kompreneble juna paro de tempo al tempo ŝercas inter si en sia dormĉambro. Erhejĵo ŝatas imiti la kantadon de Feino III dum sia mediumado, "Geedziĝon destinas la sorto," dum Ĉinjo la diron de Ĉuko II, "Indulgu, via distriktestra moŝto, iliaj horoskopoj estas malkonkordaj." Petolaj infanoj aŭdis tiujn du frazojn dum subaŭskulto ekster la fenestro kaj donis al la du profetoj novajn moknomojn. Feino III estas nomata 'Geedziĝo destinita' kaj Ĉuko II, 'Horoskopoj malkonkordaj.'

Trad. Honfan

*Ĉi tiu novelo estis verkita en la jaro 1943 dum la Kontraŭ-japana Milito en la Tajhang-montaro, Ŝansiprovinco.*

—Red.



Erhejĵo ŝatas imiti la kantadon de Feino III dum sia mediumado, "Geedziĝon destinas la sorto," dum Ĉinjo la diron de Ĉuko II, "Indulgu, via distriktestra moŝto, iliaj horoskopoj estas malkonkordaj."

# Saluto al Ĉinio

Pablo Neruda

La verkinto estas fama poeto de Ĉilio kaj membro de la Internacia Komitato de Stalina Pacpremio. Tiun ĉi poemon li verkis en septembro 1951, kiam li venis al Pekino kune kun Ilya Ehrenburg por doni pacpremion al s-rino Sung Ĉing-ling.

## I

Ĉinio, vian bildon, kiun pentris la okcidentanoj  
speciale por si, ni delonge konis:  
vi, maljuna kaj sulkplena, dronis  
en mizero senekzempla,  
kun malplena rizvazeto,  
ĉe la pordo templa.

Jen venis kaj iris militistoj  
tra via tuta lando  
kaj la murojn sange ŝmiris.  
Vi estis prirabata kiel dom' sen posedanto.  
Vi eligis al la mond' odoron strangan,  
miksaĵon de teo kaj cindro,  
dum vi, ĉe la templa pordo, kun telero  
malplena, nin rigardis per okuloj velkaj.

En Buenos-Aires vendiĝas via portreto  
farita speciale por ĝentilaj sinjorinoj,  
kaj en konversacioj viaj magiaj silaboj  
subite ŝprucis kvazaŭ lum' subtera.  
Pri viaj dinastioj ĉiuj sciis iom  
kaj pribabilis Ming aŭ porcelanon kun torditaj lipoj  
kvazaŭ ili maĉus fragon en la buŝo.  
Tiel ili volis nin kredigi, ke vi estas  
tero senhoma, aŭ lando  
kie la vento blovas tra dezertaj temploj  
kaj vagas kantante en soleco al la montoj.

Ili volis nin kredigi,  
ke vi dormas  
kaj dormos en eterna sonĝo;  
ke vi estas mistera,  
nekomprenebla, stranga,  
patrin' almozetanta en ĉifona silko.  
Dum de ĉiu haveno via  
peze ŝarĝitaj ŝipoj forveturis  
kaj la aventuristoj disputis inter si  
pri viaj heredaĵoj: mineraloj  
kaj eburoj kaj komplotis poste  
vin sangigi ĝismorte: granda ŝipo  
ekspediĝis plensarĝite de viaj ostoj.  
Tamen io okazis en la mondo.

Via portreto ne plu kontentigas nin.  
Via mizera majesteco estis bela  
sed por ni ne plu sufiĉa.  
Inter la koroj de la homoj  
flirtas la soveta flago  
kisita de kanon-pulvoro.  
Ĉinio, ni soifas al vi, kaj trans la maroj  
ekaŭdas, ke la ventbruo  
jam ne kantas en soleco sur dezertaj vojoj.

## II

Jen Maŭ ekaperis  
sur la vasta tero  
de Ĉinio  
tiom suferinta.  
Ni vidas liajn ŝultrojn  
banataj en la matenruĝo.  
De malproksimo, de la bordo de Ameriko  
niaj popolanoj aŭdas ĉiun mar-ondeton  
leviĝi en lia trankvila cerbo,  
kaj liajn paŝojn direktiĝi al la Nordo.  
Al Jen-an, en polvokovritaj vestoj,  
li direktiĝas kun gravaj movoj.  
De tiam la dezerta tero  
de Ĉinio liveras homojn  
junajn kaj maljunajn  
kun infanaj ridetoj.

Ni vidas la vivon.

Ne plu estas vi soleca lando  
nek lumas la luno apud akvo  
sur fantomaj ruinoj.  
Viro post ĉiu roko,  
nova bravulo kun fusilo.  
Kaj viaj popolanoj, Ĉinio,  
sen pano kaj sen akvo,  
pro la batalantoj  
manĝas herbon  
dum longaj tagoj  
por ke naskiĝu la aŭroro.

## III

Vi estas nek mistero, nek ĉielblua jado,  
sed popolo senkulpa kiel ni.



Kampuloj kaj soldatoj  
 nudpiedaj aŭ en ŝuoj almarŝas el ĉiu direkto  
 por defendi la integrecon de l' patri'.  
 Ni vidas en la vizaĝoj de l' kampuloj  
 niajn vizaĝojn  
 kaj en la manoj de la ferajistoj  
 niajn manojn.  
 Nomojn de viaj popolanoj ni aŭdas  
 sur la larĝaj vojoj: ili similas niajn.  
 Alie sed dolĉe sonas  
 la silaboj akraj.  
 Ili estas samaj kiel la nomoj de ĉiuj popoloj.  
 Jen la vizaĝoj kaj piedoj  
 kiuj iras kun Maŭ tra l' dezerto kaj neĝmontoj  
 por konservi la ĝermon  
 de nia propra printempo.

#### IV

La giganto kreskas paŝon post paŝo  
 kun siaj grenkampo, tero kaj loĝejo,  
 kaj estas rekonita de l' popoloj en la tuta mondo:  
 "Kiel rapide vi kreskas, frato!"  
 Tamen atentis lin ankaŭ la malamiko.  
 En la duonlumaj bankoj de Novjorko kaj Lonodono,  
 sakoj grasaj de homsango  
 diras kun timemo: "Kiu estas tiu?"  
 La giganto trankvila, rigardante sen respondo  
 al la vasta firma tero de Ĉinio,  
 kolektas kun unu mano tutan la doloron  
 kaj la mizeron, dum la alia  
 montras al la ruĝa tritiko de morgaŭ  
 kaj ĉiu liverita de la tero.  
 Sur lia larĝa vizaĝo radias  
 rideto, kiu ludas kun la vento,  
 rideto kun steloj oraj  
 super tuta la sanglago,  
 kaj tiel flirtas viaj standardoj.

#### V

Jam la popoloj vidas vin purigi vian vastan landon  
 unuigitan, kiel uragano en minaco,  
 martelo super perfiduloj kaj venka lumo  
 super la malnova malamiko, venkanta  
 respubliko, vi etendas viajn brakojn  
 por brakumi la tutan korpon,



kaj metas bazan ŝtonon por eterna paco.  
 Ĉe alia flanko de la maro venas banditaro  
 por vin prirabi, sed ĝi ricevos nepre sian merititan  
 punon.

Ĝi flugas al la katenita Tajvan  
 por nutri la idaron de skorpioj.  
 Ĝi ĵetas sin sur Koreion, fabrikas sangokrimojn,  
 malĝojon kaj detruon, jen ĝia kutima  
 tasko: dispecigitaj muroj kaj murditaj virinoj.  
 Sed iun tagon ekvenas via volontula trupo,  
 kiu plenumas sian devon pro la sankta amikeco de  
 l' homaro.  
 De maro al maro, de ebena al neĝmonto,  
 ĉiuj popoloj en la mondo vin rigardas, ho Ĉinio!  
 Ili diras: "Kia forta frato naskiĝis inter ni!"

La amerikanoj kliniĝantaj en fosajo,  
 ĉirkaŭataj de brulardaj maŝinoj,  
 mizeruloj sur la varmegaj zonoj, heroaj ministoj en  
 Bolivio,  
 laboristoj sur la vasta tero de Brazilo  
 kaj paŝtistoj sur la senlima Patagonio,  
 ĉiuj rigardas al vi kaj vin salutas, popola Ĉinio,  
 kaj sendas kun mi kison al via frunto.  
 Vi ne plu estas imago de blinda mizerulino apud  
 templo,  
 sed forta batalanto varme amata de la popolanoj,  
 kun venka batalilo en unu mano,  
 en alia grenspika garbo en formo de novluno  
 kaj sur la ŝultroj  
 la sorto de ĉiuj popoloj.

Tradukis S. J.



# ŜIN FENG-ŜIA

(daŭrigo de p. 44)

La talento de Feng-ŝia estas brila. Sed tio estas nur duono de tiu ĉi sukcesa historio. *Pingkju* devenis de la kamparanaj "lotus-rakontoj" en Nordĉinio, popularaj kantoj pri sennombraj temoj kombinitaj kun popolaj spritoj kaj humoroj. Enpenetrante en la urbon nur en la pasintaj 30 jaroj *pingkju* estas riĉa en loka koloro, en esprimaj dialektoj kaj idiomo. La teatraj formoj de *pingkju* — miksaĵo de realismo kaj la klasika teatro — estas ankoraŭ transformiĝantaj. Ili rapide sin adaptis al la nova atmosfero de liberigita Pekino. Samtempe Ŝin Feng-ŝia kaj ŝia trupo, kiel preskaŭ ĉiuj lokaj popolartistoj, partoprenis la movadon de studado pri politiko kaj arto aranĝita de la Arta kaj Literatura Buroo de Pekino.

Elstaraj kaj spertaj literaturaj kaj artaj laborantoj organiziĝis por helpi ilin reformi sian arton. Por la unua fojo Ŝin Feng-ŝia lernis la veron pri la malnova socio: kial ĝi estis regata de ekspluatistoj, kaj kiel ĝi povis ŝanĝi en tiun ĉi kiu estas tute organizita por servi al la popolo. Ŝi ekkomprenis kiel grava ŝia arto teatra estas en tiu ĉi transformo. Ŝia plialtigita politika konscio donis al ŝi novan kaj pli profundan komprenon pri la dramo. Ŝi vidis kiel la popola arto de *pingkju* estis parte malaltiganta kaj eĉ koruptiganta de la influo de la malnova reakcia socio, kaj kiel ĝi povas nun libere flori kun la natura ŝano de popola arto en la popola ŝtato. Ŝi ŝanĝis multajn liniojn en la malnovaj teatraĵoj. Kaj ŝi serĉis en la malnova repertuaro por trovi teatraĵojn kun pli modernaj, aktualaj temoj. Ŝi portis novan vigoron kaj aktualecon al *pingkju* kiu stimulis la entuziasmon de la laboranta popolo de Tien Ĉiaŭ.

Unu jaron poste Feng-ŝia kaj ŝia trupo pro la konsilo de la Buroo translokiĝis sian prezentadon en la centron de la urbo. Ĝi fariĝis la Pekina Eksperimenta Trupo de *Pingkju*. Kuraĝigitaj de la literaturaj kadroj senditaj de la registaro por helpi ilin, ili faris la unuan provon verki sian propran teatraĵon kolektive.

"La Profundo de Sufero" estas ilia unua sukceso. Ĝi estas vere speco de kolektiva aŭtobiografio pri geaktoroj. Ĝi rakontas pri la vivo sub la reakcia Kuomintang kaj pri la krimoj de la naciperfiduloj kaj lokaj krimaj bandanoj. Ĝi estis prezentata ĝuste en la printempo de 1951 kiam Pekinaj civitanoj okupis sin en la tasko ekstermi la obstinajn kontraŭrevoluciulojn kiuj ankoraŭ helpis la Usonajn intervenantojn kaj Kuomintang-postrestantojn. Ŝin Feng-ŝia mem skribis la antaŭparolon al la verko:

"Hodiaŭ ni ĝuas la respekton de la popolo kaj nia registaro. Post la sufero en tia humiliĝo kaj persekutigo, kiom profunde ni sentas la ĝojon de libereco! Kiam la listo de la arestitaj kontraŭrevoluciuloj estis publikita, ni vidis en ĝi multajn kiuj subpremis kaj persekutis nin aktorojn de *pingkju*. Ni forte subtenas la registaron je ĝiaj agoj kontraŭ la kontraŭrevoluciuloj. Ni propagandos la popolan politikon sur la scenejo de nia teatro."

Dum la monatoj de la preparado de tiu teatraĵo, Feng-ŝia pensis profunde pri la pasinteco. Kiom multe ŝi progresis en tiu unu jaro! Kiom multe de la pasinteco ŝi iam akceptis sen dubo kaj kies malverecon ŝi nun vidis en klaraj kaj veraj rilatoj. Ankoraŭ katenita en la ideoj de la malnova socio ŝi hezitis al eksedziniĝo. Nun tuj kiam tiu verkaĵo estis komencita, Ŝin Feng-ŝia ŝi iris al la Popola Juĝejo kaj petis liberigon de la fiedzo La eksedziniĝo estis aprobita. Ĝi signifas la absolutan rompiĝon kun la malaminda pasinteco.

Sekvis multfaraj monatoj. En la du jaroj depost 1949 la trupo aldonis al sia programo 30 novajn teatraĵojn kiuj inkluzivis "Bofratinon Ŝiang-lin" de Lu Sin, "Edziĝon de Erhejĉjo" de Ĉaŭ Ŝu-li kaj la famekonatan popularan "Blankhaŭan Knabinon". Ĉiu nova produkto estis eduko por la tuta trupo. Ĉiu prezentis kaj helpis solvi novajn problemojn. Tio estas klarvida ŝanĝo de "Vidvino Ma"! Novaj enhavoj donis al la kresko de *pingkju* freŝajn impetojn.

Aspirante konservi la plej bonan teatran tradicion de la ĉefurbo, la rigardantoj de Pekino estas samtempe entuziasmaj por kuraĝa reformo. Ili estas kortuŝataj de Ŝin Feng-ŝia. Al natura talento por aktori, ŝi aldonis subtilan konon de teatra tekniko. Ŝi enkondukis kaj asimilis melodiojn el la Pekina opero en sian arton kaj riĉigis la voĉan teknikon de *pingkju*-kantanto.

En la Nacia Tago lastoktobre, la Popola Registaro invitis eksterlandajn ŝtatajn gastojn rigardi ŝian verkon de la "Teksistino kaj Bovpaŝtisto". Ĝi estas unu el la plej bonaj modernaj teatraĵoj de *pingkju*. Ĝi baziĝas sur mitologia legendo pri la Teksistino, feino nubojn faranta, kiu enamiĝas al homa bovpaŝtisto, sed ŝin forprenas de la amato ŝia avino, la Diino de la Okcidento. En la bele scenigita kaj rave kostumita produkto de *pingkju*, ĝi estas rakontata kiel tragedio de junula aspiro rompita de la reakciaj principoj de la feŭda socio.

Ŝin Feng-ŝia donas al la rolo de la Teksistino eĉ pli multe ol la arta identigo de aktorino. Ŝi ŝajnas respuguli la sopirojn de sia antaŭa vivo. Tio donas specialan forton al ŝia prezento. La mito revivas kun nova signifo. Ĝi fariĝis simbolo de la batalado inter la malnova kaj nova manieroj de la vivo.

Ŝin Feng-ŝia jam enbrakumis la novajn manierojn de la vivo kun sia tuta entuziasmo de juneco. Krom ŝiaj regulaj ludoj en la Demokrata Teatro ĉiunokte, ŝi estas ankaŭ okupata fari ekstrajn prezentojn por la movado kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion. Ŝi estas membro de la Konstanta Komitato de la Demokrata Junula Ligo de Pekino. "Dramludo, vivo, laboro — estas nun unu tuto. La vivo estas riĉa kaj plena de feliĉo. Estas sen fino la laboro kiun oni povas fari por servi la popolon!"

Ŝin Feng-ŝia — la Juna Fenikso. Ŝia arto, nutrata de la nova socio, kreskas kaj marŝas sian vojon al perfekte. Ĝi alportas esperon, freŝan vivecon kaj revivigan energion al la popolo entreprenanta brilajn taskojn por la paco.

Trad. Hispano



## NI BATALIS, BATALAS KAJ BATALADOS POR FORPELI LA LUPOJN

Karaj gekamaradoj,

Je la komenco de la nova jaro ni, japana popolo ricevis tute neatenditan, grandan, brilegan donacon. Tio estas la saluto de Stalin. La saluto, kiu estas plena de amo al la japana popolo, estas akceptita kun grandaj ĝojo kaj emocio de ĉiuj japanaj popolanoj kiuj amas pacon, liberon kaj batalas por la sendependeco de la patrolando. Kontraŭe nur imperiistoj de Usono kaj naciperfiduloj de Joŝida ĝin ricevis malagrabla.

Lupo estas lupo, kiel ajn ĝi tualetas sin kvazaŭ bonkora. Por forpeli la lupojn, ni batalis, batalas kaj batalados.

Kiom da kuraĝo kaj firma konvinko portis al ni la saluto de Stalin! Ni absolute ne malobeos la deziron de nia granda gvidanto Stalin.

el letero de S, Japanio.

### ESPERANTO — MIA NOVA KLASBATALILO

Karaj gekamaradoj,

Mi estas 27-jara ano de la Japana Komunista Partio. Fine de la malbeninda milito mi liberiĝis de longa arma vivo kaj mi revenis al la naskiĝloko. Mi povis rekoni nenion, ĉar mia amata urbo estis cindrigita de brulego kaŭzita de aeratakado. Feliĉe mi tuj povis labori en malgranda metalfabrika en la urbo. Sed mia vivo laborista daŭris ne longe, ĉar la fabriko bankrotiĝis pro la granda ekonomia krizo. Ni aktive batalis kontraŭ senlaboreco, sed rezulte ni forjetiĝis en la senlaborulajn amasojn. Mi estis hardigita al vera laboristo, kiu havas klasan konscion, en la fabriko. Mi aliĝis al nia partio, la Japana Komunista Partio. Ekde tiam, mi laboris en la sindikato de metallaboristoj kaj gvidis kelkajn batalojn. Kaj poste mi iĝis aktiva membro de nia partio kaj pretas oferi mian tutan vivon por nia partio.

Ĝis nun, dum kvar jaroj, kelkajn taskojn mi plenumis en kelkaj postenoj por nia partio kaj revolucio.

Sed, ho ve! mia pulmo estis eroziita de tuberkulozo, kaj kuracisto konsilis al mi, ke mi ne moviĝadu!

En tiu ĉi akra batalo kontraŭ imperiismo, ĉu mi devas fari nenion? Tio estas netolerebla. Mi eklernis Esperanton. Kompreneble kun tio

mi partoprenos en la klasbatalo. Mi ankoraŭ ne skribas lerte en Esperanto sed mi devas komenci korespondi frue, ĉar ju pli rapide, des pli ĝi plirapidigos la disvolvon de nia batalo. Pro tio, bonvolu simpatii mian senton. Mia deziro estas: ricevi gazetojn aŭ librojn en Esperanto eldonitajn en via lando kaj korespondi kun viaj geesperantistoj.

Atendante vian respondon salutas via japana amiko S. S.

### MI BATALAS POR LA SANKTA LIBERECO DE LA PATRIO KAJ TUTMONDA PACO

Karaj samideanoj!

Mi estas juna esperantisto kaj nun sur korea fronto mi batalas kontraŭ la malamikoj por la sankta libereco de la patrio kaj tutmonda paco.

Mi elkore dankas la grandan helpon de via lando. Nun mi tre be-



daŭras ke mi ne povas lerte skribi en Esperanto, sed mi kore deziras korespondi kun samideanoj en via lando.

Bonkore sendu al mi plezurajn leterojn. Mi atendas viajn respondojn.

Vivu la solidareco inter Ĉinio kaj Koreio!

*Frate via  
Cung Zunghaŭ*

*Ni estas pretaj transsendi al la korea kamarado leterojn de tiuj kiuj deziras korespondi kun li.*

La red.

### NE HELPAS ARTIFIKO KONTRAŭ PACBATALANTOJ

Karaj gekamaradoj!

Kun granda intereso kaj dankemo mi ricevis vian gazeton "El Popola Ĉinio." Mi volas danki vin korege pro tio. Via gazeto tiel ege valoras por ni pacamaj esperantistoj.

En la fino de julio kaj komenco de aŭgusto (1951) mi partoprenis en la Esperanta Kongreso de S.A.T. en

Stockholmo kaj mi povas rakonti al vi, ĉinaj esperantistoj ke tie, en la kongreso estis granda pacfrakcio, jes tiel granda ke la SAT-gvidantaro ne kuraĝis baloti pri nia propono rilate saluttelegramon al la Berlina festivalo. Oni uzis la artifikon aserti ke ne estas laborkonsidero kaj per tio oni sukcesis malebligi balotadon pri nia propono. Sed tamen ni sukcesis per manlevo montri al la kongreso kiel multaj pacamikoj ni estas kaj poste ni sendis la saluttelegramon al Berlino en la nomo de nia frakcio.

Mi estas pacbatalanto, kolektinta subskribojn por la Stockholma Pacalvoko kaj nun por la Berlina apelacio. Kune kun via popolo, la rusa popolo, la popoloj en la popoldemokratiaj kaj ĉiuj progresemaj homoj en la mondo mi volas batali por paco kaj feliĉo en la mondo.

Mi korege salutas vin.

*Via sicera kamarado*

Karl Kvist

Box 109 Deje, Svedio

### GARANTIU LA MONDPACON PER LA INTERPOPOLA KOMPREENIĜO

Al Ĉina Esperanto-Ligo

Kun granda ĝojo ni ricevis vian leteron kaj la aldonaĵojn: 1 ekz. Popol-bildgazeto; 1 ekz. Ĉina Popoljurnalo kaj 3 desegnaĵoj kaj ni kore dankas al vi pro tio.

Per la sendo de via riĉenhava bildmaterialo vi donis al ni dokumentajn pruvojn pri la potenca kaj rapidega evoluiganta eklaboro en via lando.

Nia interŝanĝo de gazetoj kaj fotoj kondukis al vigla intelekta interrilato kaj al profunda amikeco inter niaj du pacamantaj popoldemokratiaj landoj.

Same kiel ĉe vi, ankaŭ ĉe ni okazas socia ŝanĝo el la disŝireco de la postmilitaj situacioj kaj la iama kapitalismo al socialismo por plibona estonteco.

La propagandmaterialon, kiun vi sendis al ni, ni uzis kiel dekoracion de "murgazeto" en nia ministerio, kaj ni opinias, ke ni per la ebleco de la studo de ĝi kaj la sur ĝi montritaj gazetoj, per ĉiuj vizitantoj plej bone varbis por Popol-Ĉinio. Nia amikeco certe helpas garantii la mondpacon per la interpopola kompreniĝo.

Kun interpopola saluto  
de la Regna-Registaro  
Brandenburg

de la Ministerio por  
Popolklerigo

Germanio

## Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) *Sendi al ni 4 ekzemplerojn* de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la *jurnalo aŭ gazeto*, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

La Red.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno eldonata  
de Fremdlingva Eldonejo

26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

## ENHAVO

*Bildo sur la kovrilo—Studentino,  
Soldatino kaj Laboristino*

*Forta Gardilo de Paco kaj  
Sekureco*

*Haltu, Sangsoifaj Krimuloj!*

*La Popola Liberiga Armeo kaj  
la Tibeta Popolo*

*La Virina Movado de Nova Ĉinio  
Ŝinkang — Nova Norda Haveno  
de Ĉinio*

*Vizito al Kuejlin-Vilaĝo  
Kulturaj Rilatoj inter Ĉinio kaj  
Sovetunio*

*Nova Ĉinio en Bildoj — Ĉinia-  
Sovetia Amikeco; Ĉinaj Viri-  
noj en Konstruado kaj Pac-  
defendo*

*Ŝin Feng-ŝia*

*La Ovo-libroj*

*Ediĝo de Erhejĝo*

*Saluto al Ĉinio*

## PAGU AL NIAJ PERANTOJ

**Aŭstralio:** Steve Bennett, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park,  
N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)

**Aŭstrio:** Antonio Balague, St.-Pölten, Kirchenweg 12.  
(Jarabono 20 schilling-oj)

**Belgio:** Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10, Bruselo.  
(Poŝtĉekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)

**Britlando:** (1) F-ino F. Paraige, 10 Woronzow Road, St. John's  
Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)  
(2) **Universala Esperanto-Asocio**, Heronsgate, Rick-  
mansworth, (Herts.).  
(3) **Collet's Subscription Department**, 40 Great Russell  
Street, London, W. C. 1.

**Bulgario:** (1) **Bulgara Esperantista Kooperativo**, Sofia—Str. TRI  
UŜI, 15. (Jarabono 200 Lv.)  
(2) **Ivan Kovaĉev**, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.

**Ĉeĥoslovakio:** Burda Rudolf, Plzen-palackeho N. ě, 6,  
(Jarabono 50 kĉs.)

**Danlando:** Borge Astrup, Ymersvej 32, Randers.  
(Jarabono 6 kronoj)

**Finnlando:** Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9.  
(Jarabono: 300 Fmk.)

**Francio:** **Labor-Esperantista Federacio**, sekretarioj: 4 str. Gen.  
Malleterre, PARIS 16. CCP 902-52 (Jarabono: Fr. F. 450)

**Germanio:** (1) **Helmut Löffler**, Mittweida/Sachsen, Theaterstrasse 1.  
(Jarabono: 6 D.M.)  
(2) **Heiny Knorr**, (24) Hamburg-Wellingsbüttel,  
Ekerkamp 81.

**Hungario:** (1) **KULTURA**, Budapest, V. Akademia u. 10.  
(Jarabono 15 forintoj)  
(2) **Marton Lajos**, Bors.-u. 2, Budapest, XII,  
(poŝtkonto 38.187)

**Islando:** Sigurdur Gudmundsson, Falkagata 1, Reykjavik.  
(Jarabono 15 kronoj)

**Italio:** (1) **Itala Laborista Esperanto-Asocio**, Via Modena 33—  
Torino. (Jarabono: 400 liroj)  
(2) **Eduardo Zumbo**, Casella postale 226, Torino.

**Izraelio:** **Bencion H. Danon**, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)

**Japanio:** (jarabono 360 jen-oj)

**Nederlando:** (1) **Heroldo de Esperanto**, Harstenhoekweg 223,  
Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)  
(2) **Esperanto-Grupo Vaals**, Pr. Bernhard-str. 4, Vaals.

**Pollando:** **Asocio de Esperantistoj en Pollando**, Warszawa Marszal-  
kowska 81/32. (Poŝtĉeka konto I—4329/113)  
(Jarabono 12 zl.)

**Rumanio:** **Rumana Esperantista Societo**, București I, Bulev. 6  
Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)

**Svedio:** **Einar Adamson**, Värmlandsgatan 18, Göteborg.  
(Jarabono 5 kronoj)

**Usono:** (jarabono \$1.25)

**Rim:** Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-kuponoj  
(1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj).  
Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.